

Esperanto — Rok — Fangazeto

ROK-GAZET'

TEKSTOJ
NOVAĴOJ
INTERVJUOJ
KONCERT-FESTIVALOJ
REPORTERAĴOJ
E-ROK-TERMINARO
ANONCOJ
ESPERANTO-ROK-RETO
NOVAJ DISKOJ-KASEDOJ








Eldonas EUROKKA
EUROKKA - F-31450 DONNEVILLE

NUMERO 2
Jaro 1991



Rok-Gazet' n°2

Administration-rédaction/
Administrejo-redaktejo/
Rok-Gazet' c/o EUROKKA
F-31450 DONNEVILLE
TEL (33)61.81.95.65

Directeur de publication/
Eldon-direktoro:
Floreal MARTORELL

Redacteur en chef/
Ĉefredaktoro
Bertrando ALBAULT
Berdoulet Ouest
FONTENILLES
31470 St-LYS
(33)61.91.16.34

Rédacteurs
Redaktora stabo:
Bertilo WENNERGREN
Andreo ORLOV ®1 &
Kruela DEVIL
Nikolao VOLOŜIN &
Betti MAUL &
☆ FLO ★
Dimitàr TERZIEV &
Rikardo CASH
Oleg SVIRSKIJ &
NikSt &
Solange ARAUJO
Marcelo REDOULEZ &
Isabelle JACOB
JORGOS
Flavio FONSECA &
ANCXJO &

PAO,MAE:/
KOMPUTILIS KAJ TAJPIS
Bertrando
Bertilo
Marcelo
Nikola
RoKo

Dessins/Desegnajoj
Niko
Kruela Devil
JMB

Photos/Fotoj
Flo MARTORELL
Mchel COLLOBERT
Yves BARAT

ENPAĜIGO/ MAQUETTE
FLO FLO
RoKo
Sylvie BAUDIN
Bertrando
Bertilo

Imprimerie/presejo
IMPRIMERIE CRYSTAL
F-31450 DEYME

Distribution/disdono
Associations Espérantistes
Esperantistaj Asocioj
Dépot légal à parution
Commission paritaire en cours
édité par/Eldonas
EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE

Oficiala Klaĉado

Kiel kutime mi eniros la varman buljonon dezirante al vi ĉiuj plej agrablajn feriojn kaj plezurajn kongresojn.

Mi esperas ke ĉifoje la abontarifoj estis pli taŭge elstuditaj kaj ke niaj perantoj helpos nin efike en nia malfacila tasko.

Mi konstatis multajn miskomprenojn de nia antaŭa abontarifo: prezindikoj por nepagipovaj landoj neniam celis ke tieaj samideanoj devus pagi en $(USD). Tio estis nur provo indiki proksimuman prezon por la abono. Nepre ne aĉetu $ je nigra merkato aŭ eĉ aliajn valutojn: estas multe pli taŭgaj kaj malkostaj solvoj kiu iom post iom surpleddiĝas.

EUROKKA projektas lanĉi varbkampanjon por Rok-Gazet' en pagipovaj landoj. Ni pristudos ĉiujn proponojn laŭ niaj malgrandaj eblecoj: plej interesa estus la reklam-interŝanĝo.

Esperante trapasi mem plej ĝojan someron mi deziras al vi plej feliĉigan legadon. Ĝis la venonta numero de Rok-Gazet',

Bertrando

Fotoj sur la antaŭa kovrilo:
-ALIBI
-La ROZMARIAJ BEBOJ
-FLAVIO FONSECA

Abono: 4 numeroj
por 26 IRPK aŭ:

Aŭstralio	26AUD
Aŭstrio	215ATS
Belgio	625BEF
Britio	10GDP
Danio	123DKK
Finnlando	73SFM
Francio	100FRF
Germanio	33DEM
Grekio	1700GRD
Hinda Unio	90IMR
Hispanio	1600ESP
Irlando	10IRP
Islando	20USD
Israelo	18USD
Italio	21500ITL
Japanio	3000JPY
Jugoslavio	13USD
Kanado	21LAD
Korea Resp	18USD
Luksemburg	625LUF
Nederlando	35NLG
Norvegio	112NK
Nov-zelando	30NZD
Portugalio	1700PTE
Suda Afriko	20USD
Svedio	112SEK
Svislando	28CHF
Usono	20USD

Por aliaj landoj, skribu al ni por interkoncenti abonprezon.

Bankkonto: B 15999 G 2206
N° C 40247960 CL 10
CCM Toulouse St-Agne
F-31400 Toulouse, Francio
UEA Kodo: Rokk-b





Anonctarifo:

- Dorskovrila anonco 2000 FRF/400 USD
- 1 interna paĝo 1000 FRF/200 USD
- 1/2 paĝo 600 FRF/120 USD
- 1/4 paĝo 300 FRF/ 60 USD
- 1/8 paĝo 200 FRF/ 40 USD
- 1/16 paĝo 100 FRF/ 20 USD

50% Rabato por Esperanto-rokbandoj.

Anoncetoj:
Ĉiu linio kostas:
6 FRF/ 1,20 USD aŭ 2 Irpk

LANDAJ KOTIZPERANTOJ

- Argentino: Atiljo Orellana-Rojas.,Argentina Esperanto Asocio C.C1428 , 5000 CORDOBA
- Brasilo: Brasila Esperanto-ligo CX.Postal 11-1105, BRASILIA-DF 70084 BRASILO
- Britio: EAB - 140 Holland Park Avenue.LONDON -W11 4UF
- Bulgario: Ilija ANDREEV, pk.120, BG -9700 Ŝumen
- Hungario: Lingvo Szolgaltato Iroda H-1675 BUDAPEST PF.87
- Sovetunio: Niko VOLOŜIN SU-263018. UKRANIO- LUCK-18,a.k.26



ENHAVO

URSO, ABONOJ, ANONCTARIFOJ KAJ ALIAJ OFICIALAĴOJ 2

NOMOJ DE MUZIKSTILOJ 23

INTERVJUO :
ROZMARIAJ BEBOJ....................8

MALROKMUZIKO :
Ĉu vi konas BRASSENS 12
KAZAĤIAJ TROBADOROJ 14

REPORTERAĴOJ:
KAJTO EN VENTO 15

BANDOJ & GRUPOJ :
ALIBI...16

TUTE NE GRAVAS :
Letero el LISBONO 20
REAGE AL REAGOJ......................20
Ĉesu min SEPULTI......................21

KRITIKLOJ :
AERLUMO......................................13
KOSMO INFANO............................7
Jen la DESTIN'..............................4

HASTE KLAĈE..................................11
NEKROLOGO NE TRO LOGA...........22
ANONCETOJ 25
Radio anoncoj 25
PLIAJ MAŜOJ POR LA RETO 26
EUROKKAĴOJ 28

Legenda:
& resendas al la Reto en ĉi numero
@ resendas al la Reto en antaŭaj numeroj
X)pp resendas al n°X paĝo pp

GRAVAJ OKAZAĴO KAJ ALVOKO

La apero de ĉi-tiu nova numero de Rok-gazet' estas substrekita de grava evento kiu ĝojigis min. Naskiĝis mia unua bebo kiu prezentas sin: KARLIN'

Estas mia nomo.
Mi bone alvenis la 8an de majo 1991
kaj de tiam, paĉjo kaj panjo ne enuas ...
sed tio plezurigas ilin.

Mi povas diri ke ŝi tre bone fartas; Sylvie (la patrino) kaj mi, decidis ke la naskiĝo okazu hejme helpitaj de akuŝistino kiu konsentis pri natura akuŝo sen perforteco en vertikala pozicio, ekologie.





Ĉio iris glate. KARLIN' estas tre bela. Ŝajnas ke jam ŝi komprenas la plej internacian lingvon; ŝi tre ŝatas muzikon ĉiuspecan, sed ĉefe rokan.

Kiel por ni ĉiuj, muziko gravegas, sen ĝi ni ne povus agrable gustumi kaj ĝui la vivon. Sen muziko kaj sen esperanto, Rok-gazet' ne ekzistus. La du plej internaciaj komunikiloj kuniĝas en tiu ĉi fangazeto kaj espereble ili kunvivos senfino. Sed ankaù sen vi Rok-gazet' ne ekzistus. Ni bezonas informojn kaj materialon, ni petas ke vi regule informu nin, vi utiligu Rok-gazet'-n kiel ilo, pro tio EUROKKA kreis ĝin. Esperanto-kulturo kreskas vi partoprenas al tiu evoluo. La plej malgranda informo povas interesi ĉiujn legantojn. Por ni la laboro estas ege malfacila ĉar ni devas rikolti informojn kaj materialon el la diversaj mondpartoj. Nuntempe ni devas serĉi kaj alvoki por ke la informoj kaj materialo alvenu. Sed ni esperas ke rapide ĉiuj el vi aùtomate sendos al nia redakcio bezonantajn materialojn. Via helpo ŝparus tempon kaj energion en nia laboro. Tio koncernas vin ĉiujn :
- artistoj, muzik-grupoj, muzikistoj, organizantoj, muzik-ŝatantoj, rokuloj, malrokuloj, rokemuloj, E-aktivuloj, E-asocioj, muzik-asocioj, rok-asocioj, rok-bandoj, legantoj ktp...
Reagu se vi deziras ke Rok-gazet daùre aperu !
Ni bezonas la subtenon de ĉiuj el vi, kunlaboru, abonu kaj aliĝu al nia agado!
Ĉiukaze ni deziras al vi agrablan momenton kun ni. Bonan legadon!

FLO!



Jen la DESTIN'!

Ĝis la unua de aprilo (tio ja ne estas fiŝo!) kiam mi ekkomencis tiun artikolon, ni ankoraŭ ne havis novaĵojn pri Vladimir Soroka. Krom tiu fama disko pri kiu mi apenaŭ interparentezis la ekziston en la artikolo de A.Ananjin.

Fakte mi pensas ke neniu plu bedaŭras tiom longan atendon (eble ĉirkaŭ kvar-kvin jaroj) ĉar tio valoris la penon. Mi povis havi finfine surbendigon de Destin nur de dekkvin tagoj kaj esperas ke estos sufiĉe da por ke mi povu akiri unu!

La enhavo estas plej etosa muziko kiu ĉerpas ĉie, elĉerpante nenion nek neniun, kvankam ĝi estas plensargita je diversaj emocioj; pri amo, pri feliĉo kaj malo, pri obstin', milit' kaj destin'. Sur la dorsa flanko de l kovrilo ĉiu povos malkovri la tekstojn kompletigitaj de sentoplenaj klarigoj.

Pri la kvalito de la albumo mi povas nenion diri: mi trovas ĝin perfekta kaj senĉese aŭskultas ĝin.

Muzike mi tie eltrovis plej diversajn influojn kiel vigla pinto da Zappa, dolĉa ŝmiro da Pink Floyd, du fingrojn da Beatles, bonan trancon da klasika muziko, larmojn da popolmuzikoj kaj aliaj. Plenplenigu gisrande per Soroka, ĝisfunde miksu kaj servu en ŝvelmola fotelo!

Kiam vi scios ke iu famulo el ĉimkent partoprenas la albumon ... kaj ankaŭ produktigis sian propran disketon de la sama sovetia firmao vi tuj komprenos ke tiu disko meritas plej grandan sukceson. Ĉar krom Soroka kaj Amzejev, multaj muzikistoj, kantistoj kaj teknikistoj partoprenis la prilaboradon de Destin'.

Mi ja havas nur ion pli por deziri: ke tuja estonteco alportu al Esperantio multajn verkojn de tiom bonaj kvalito kaj sentdenseco...

Sed jen ĉio ja povas okazi kaj ni finfine ricevis novaĵojn de la soveta Pigo. Kaj eĉ artikolon kiun mi lasos vin legi tra viaj propraj kaj sekaj okuloj(priatentu ke ili eble ne daŭre restos tiaj) Jen la besto:

PARTO 1 PRI A-MIKOJ, PRI MI KAJ
PRI BEBO, KIU KOMENCIS PAROLI
KAJ LEGI SAMTEMPE.

A. Mia kampo estas Sovetia originala E-kanto. Ekde 1981 mi kun miaj amikoj ĉiujare semas kaj rikoltas ĝin, nature sekvante la plej riĉan E-kulturan tradicion en Sovetunio. Nia kanta familio ĉiam estis tiom granda, ke apenaŭ ie vi trovas ion similan por kompari[...] Por ni ĉiuj plej fruktodona estis certe fama 1986, kiam dum ottaj


Vladimir Soroka

E-renkontiĝoj svarmis diversspeca muzikplenplena popolo: bardoj, kantistoj, verkistoj, akompanantoj, tradukistoj. Nur nia ensemblo recitalis tiusomere dum kvar grandaj E-renkontiĝoj; kromis pli ol cent koncertoj, kvinono da kiuj esperant-esencis. Kaj dum tiu ĉi tempo, kiam niaj ĉemizoj ne sukcesis sekiĝi je koncerta ŝvito tiama prezidanto de URO ASE Majburova E.D. asertis ke ensemblo de V. Soroka ne plu ekzistas. Laŭ mia memoro ni terure koleriĝis pri ŝi tiam. Nun paraleligante tiun anekdotan historion kun nova priĵuĝo de "la Stelo", mi jam ne plu havas emon pisti similajn sentojn.

B. Ju pli antaŭen mi moviĝas laŭ E-arta branĉo, des pli klare vidas en kiom malsana stato troviĝas nia arbo. Ĉefaj malsanoj - diletanteco, disagemeco, manko de nova pensmaniero- estas tiom evidentaj, ke ne sufiĉas nur konstati tion. Bezonatas ago.(ndlr:pro kio Rok-Gazet'!)

Eble komence de jarcento nura disvolvo de E-literaturo aspektis kiel natura impulso por kreskanta genia bebo, kiu komencis paroli kaj legi samtempe. Sed hodiaŭ, pardonu, ĉepordas sekvonta jarcento. La mondo ŝajnas komplete alia nun. ĝi progresas kreante sian kulturan medion per pli kaj pli perfektaj rimedoj. Kinematografio, video, muzika altnivela sonindustrio aperis sur ĉemonda horizonto tiel antaŭlongue, kaj homaj okuloj kaj oreloj tiom rapide kaj bone adaptiĝis al perfekta bildo kaj sono, ke distingas E-aĵojn ne laŭprononce sed laŭ aĉa kvalito de niaj surbendigaĵoj. Ni kvazaŭ detranĉis nin de la tuta mondo per nia arkaika gusto kaj malalta teknika nivelo. Sola tierajo restas la E-literaturo.






Amaso da saĝaj, junaj bonkoraj, talentaj, agemaj, simpatiaj homoj tuj viciĝus al la E-ambasadorejo se estus allogintaj. Ĉiujare laŭ mi ni perdas milojn da ili nur pro nia praa lecion-naŭziga propagando. Esperanto-viruso postulas hodiaŭ multe pli altan temperaturon kaj ofte pli kurtan distancon por penetri kiel eble proksime al koro. Ne sencas pruvi aksiomon, ke nur etoso plena de inspiro, aktiveco kaj intereso povas konkeri la samriĉan personon. Laŭ mi ni povontus trempi al nia medio multege da junuloj, kondiĉe se prioritata en tiu ĉi direkto iĝus subteno de nia inspirplena talentaro. Sed, diable -ekvigliĝos vi - kiel praktike efektivigi tiun belan sonĝon, kiun Esperantujo spektas denaske?!
Atendu kara sentolerulo, ĉio sekvos laŭvice; lasu la dolĉaĵon por deserto.



PARTO 2. REGIONO DE EKOLOGIA KATASTROFO.

Certe vi ne povas tion rimarki, lulanta sur lazuraj ondoj, ĉirkaŭblovata per varma brizo, enspiranta sanigan riĉodoran aeron. Tamen, malgraŭ tio ekologia katastrofo proksimiĝas al ni obstine kaj senhalte sur tuta surfaco de Sovetia kanta E-kulturo.(ndlr: ĉu nur? Kia optimismo!)

Ensemblo de Ĵomart Amzejev(Ĉimkent Kazaĥio), ensemblo de Jelena Bistrickaja(Hmeljnickij-Ukrainio), plej juna ensemblo el Toljatti- rusio... Tiuj ĉi sorĉaj insuloj pitoreskaj jam ne plu estas troveblaj eĉ sur la E-mapo. Ili malaperis por ĉiam. Inspirplena, muzikedukita gento kiu kreis sur tiu talentfekunda grundo estis riĉiganta nian kulturon per siaj originalaj E-programoj, kantantludanta plejparte akustike, uzanta popolajn muzikilojn... Tim Sobakin, Dajva, Peĉonkin, Fortuŝnij, ensemblo el Lviv, Samarkando - Eble dum vi legas ĉi tiun revuon la ora ĉeno plilongiĝas. Sed ĝi ne plibeligas kolon de nia ĉarma E-muzo, ĝi katene bruas sur ŝiaj kruroj. Ŝajnas ke tiu terura muziko por ĉiam sonos en mia koro. Ĝi lasas min nek ripozi nek verki dum unu sola demando atakas mian cerbon: kiel liberigi Muzon?

PARTO 3 EN FINO DE EKSPOZICIO aŭ KIEL PER UNU PAFO MORTIGI DU LEPOROJN

Bedaŭrinde ni ne havas eblecon revenigi perditan tempon, sed ni kapablas fari multon por savi almenaŭ tion, kion ni ankoraŭ havas.

Solvo de la problemo radikas en fino de neantaŭlonge malfermita ekspozicio, konsistanta el tri haloj. Ĝi tiom bone lumigita staras meze de mia cerbo, ke mi kuraĝas montri ĝin al vi. Do laŭvice:

1a halo enhavas tri simbolajn bildojn. Sur unua- amaso da homoj serĉantaj trezoron kaj ne rimarkantaj ĝin apud ili. Sur dua- knabeto, kiu elektas el nekonataj bombonoj tiun, kiu havas sur sia kovrilpapereto plej buntkoloran desegnaĵon. Sur tria - semantoj, klopodantaj prilabori tutan teron permane.

2an halon plene okupas grandega slabo. Sur ĝia surfaco profunde elĉizelitaj dormas la vortoj: "Junularo kaj Esperanto jam delonge serĉas unu la alian. Helpi ilin povas nur pli aĝa frato de Esperanto - muzika internacia lingvo. Trafante koron subkonscie rekte Muziko dum ĉiuj tempoj estas por junaj homoj Aero, dum libro restas eĉ ne akvo, sed nur manĝo. Do prenu kompason por trovi la vojon, prenu ŝlosilon, malfermu la pordon. Amen."

3a halo. Lasta. moderna ekzemplero de perfekta porkampara semmaŝino "VIDEO-MUZIKA STUDIO SURBENDIGA", kiu ankaŭ favoruzeblas en forcejoj (kulturaj E-festivaloj, aliaj diversspecaj E-renkontiĝoj).



a) Nia riĉega E-kantkulturo savitas
b) Junularo atingeblas.

Se vi ne konsentas, provu min konvinki! Nur ne parolu pri nia literaturo(tiu plej longa kruro): ne efikos. Mi dum dek jaroj atentas al nia lama Esperanto kaj ne opinias, ke ĉi malsano povas servi kiel avantaĝo.

PARTO 4 ĈU PLU DISIPI FORTON AŬ KONCENTRIGI ĜIN AL FRONTA LINIO

Ĉu vi scias, kiom kostas surbendigi unu kanton en Sovetunia profesia muzik-studio? De unu ĝis dek mezmonataj salajroj. En ekstersovetio, multe malpli, sed la prezoj tamen ŝajnas sufiĉe altaj por okcidentaj muzikistoj. Ĉiujare ni disjetas monon ĉiu flanken anstataŭ kolekti ĝin por havi nian propran E-muzikan studion. Skrupule analizanta kaŭzojn de niaj perdoj kaj konsideranta mian televid-radi-festival-studian sperton en Sovetunio, Slovakio kaj iom en Svedio mi klare komprenas, ken sen nia propra semmaŝino ni baldaŭ plene senfortiĝos. Mi tre volas, ke ankaŭ vi tion komprenu.

PARTO 5. KION FARAS PIGOJ EN SVEDIO?

Dek jaroj da laborego en la E-kamparo! Rezulto? : artikoloj pri mortinta stelo... Pli ol malagrable kaj stulte.

Ĉiu jare (krom 1985, 1988) nia ensemblo havis novan originalan programon por esperantistoj, ankaŭ aliaj profesie prepariĝis al ĉiu E-sezono. Festivaloj koncertoj, konkursoj... Sed kion ni havas nun? Aŭ pli bone demandi: kion vi havos nun? Nekrologesencajn artikolojn pri muziko kiun vi ne aŭdis kaj jam neniam aŭdos? Pli enuan ne eblas elpensi!(ndlr: Oh, jes, facile! tutsimple blanka paĝo aŭ pli terure: malplena Rok-Gazet')

Kiam mi komprenis, ke tiu marŝado sur unu sama loko povas daŭriĝi ankoraŭ dek jarojn;
Kiam mi ekvidis, ke artistoj, ĉesintaj koncerti lasas por ni nur rememorojn;
Kiam mi eksciis, ke televid- kaj radi-redaktoroj rifuzas de multaj niaj muzikajn materialojn nur pro ilia duba kvalito
Kiam mi eksentis la studiajn KOSTOJN

Mi maturiĝis por lanĉi mian propran aferon, kies nomo estos: INTERNACIA PROFESIA(SENPAGA POR ESPERANTISTOJ) MUZIKA STUDIO (vidu enmikson)

Por organizi ĝin mi frostigis tutan mian ceteran laboron krom komponado kaj kelkaj aferoj ligitaj kun muzika centro ĉe Feja. Kaj kune kun Oksana provizore transloĝiĝis al Stokholmo. Ĉi tie ni salajras ludante surstrate. La tuta mono ĝis lasta krono venas al studia konto, kie hodiaŭ kuŝas 35 000 kr. Por starto, tamen, bezonatas 250 000 - 300 000 kr. Se neniu malhelpos, ĝi ekos de 1992. Se helpos, pli frue. Ankaŭ dum tiu jaro ni devos elekti landon kie ĝi situos. ĝis nun ni havas du proponojn:

1) en urbo Poltava (Ukrainio) en privata domo
2) en urbo Riga (Latvio) en eksterurba vilao

Dezeiratas ajnaj aliaj variantoj, kondiĉe se ili esencos seriozaj. Kaj deziru al ni bonŝancon.

3) Sed eble ni devos rezigni pri Sovetunio, vidu enmikson (ADLR)

Sincere via Pigo.


Pigo = *soroka* en la Rusa.

ATENTU MUZIKEMULOJ!

Estas organizata internacia filantropia muzika Esperanto-studio.
Planata malfermo - aŭtuno 1992.







Nia studio estas privata entrepreno, ĝia sola celo – helpi al muzikistoj laborantaj en originala Esperanta kantoĝenro registri siajn verkojn altkvalite.

Profesia multkanala aparataro kaj studiservoj estos por ili ne nur favorprezaj, sed eĉ senpagaj.

La senpaga registrado estas nia ĉefa principo. Ni planas funkciigi la studion tiamaniere: vi, kiu ekinteresiĝis pri la afero, sendas al ni viajn muziknotojn aŭ demonstrajn kasedojn, fotojn ktp. Se ili interesas nin, vi rajtas anticipe mendi tempon por via registrado. Post kiam la tempoperiodo estos rezervita. Sciu, ke dum rezervita tempo la studio estos plene je via dispono. Ankaŭ gravas, ke ni preskaŭ ne limigas registroperiodon.

Laboro sen hasto kaj streĉo estas alia studia principo.

Nia studio havas sonreĝisoron. Sed vi rajtas venigi vian propran. Tiukaze tamen la studio ne pripagas lian laboron.

Post registrado vi estas sola posedanto de la mastra bendo. Tiumaniere plia eldon- kaj disvastiglaboro dependas nur de vi. La studio nur konservas la rajton uzi la registritan materialon por reklamaj celoj.

PRI LA NUNA STATO

Gravas du punktoj:

1. Investoj.

Somere 1989 en Stokholmo ni organizis entreprenon, kies tuta enspezo venas al studikonto. Hodiaŭ ni jam kolektis duonon de la bezonata sumo por 16-kanala studio. Se la enspezritmo restos stabila, la studio ekfunkcios jam aŭtune 1992. Mi ankaŭ informas vin, ke en Sovetio aperis mia aŭtora disko *Destin'*, kies unua flanko en pop-romantismo rakontas pri amo kaj amikeco de gejunuloj, kaj kies dua flanko estas la mini-opero *Destin'* aŭ *Tragedio de Homo*. La tuta enspezo de la eldonkvanta parto dediĉita al pagipovaj landoj venos al la studikonto.

2. Lokado.

Ĝis lasta tempo la bildo pri lokado de la studio estis sufiĉe klara. Ni planis loki ĝin en Sovetio en privata duetaĝa domo. Sed nun kaŭze de ekonomia kaj politika kaoso en nia lando, ni dubas ke tiu ĉi decido estos definitiva.

Kun plezuro kaj dankemo, ni konatiĝus kun viaj ideoj kaj proponoj pri eventualaj enspezebloj, taŭga situo de la studio, kaj ĉio ajn, kio rilatas al nia entrepreno.



Ĉiujn opiniojn, ideojn, demandojn pri studilaboro kaj diskomendoj, mi petas sendi al la jena adreso:

ESPERANTO-CENTRO
Vladimir Soroka
Brunnsgatan 21
S-111 38 Stockholm
Svedio

Profite okazon mi ŝatas kore danki ĉiujn, kiuj subtenis nian iniciaton. Unuavice varman kompanion de La Ranetoj kaj membrojn de aliaj Stokholmaj Esperantaj unuiĝoj, sen kiuj nia afero restus nur bela revo. Mi ankaŭ dankas ĉiujn muzikistojn, kiuj inspiras nin per sia entuziasmo, kaj kiuj esperas pri la rezulto.

Koran dankon al vi, geamikoj. Ĝis la!

Sincere via *Pigo*

KOSMO-INFANO




Eduardo Vargas Gutierrez

Jen finfine iom pli pri la bando Solo el Malaga(Malago); precipe pri ĝia unua albumo: KOSMO INFANO. Malkutima prezento por tiu granda disko kiu malgraŭ samaj dimensioj ne estas diskego: efektive ĝi enhavas nur kvin pecojn de normala daŭro, tio estas apenaŭ iom pli ol la enhavo de disketoj kiel ekz. la unua produktaĵo de VinilKosmo(verŝajne la titolo de la albumo neniel rilatas).

La kovrilon vidu ĉi apude, kvankam mankas koloroj: la fundo estas blua, la eltonditaj bildetoj verdaj, la brako ruĝa, Eduardo Vargas natura kaj Zamenhof sur dorsa flanko! Tie ankaŭ troveblos la kvin tekstoj manskribitaj de Vargas mem sur paĝoj de notkajereto. Kroma paĝo surhavas vorteton de Eduardo kun jena demando: ĉu vi pensas ke Zamenhof estis ankaŭ muzikisto?

La disko estas eldonita far A.E.U. kaj produktita de Solo kaj A.E.U. ĝi estis surbendigita digitale far A.C.M., profesia surbendig-entrepreno el Madrido.









Solo sciis uzi siajn sintezilojn alimaniere ol la ĉiutaga maskomuzikala ritmenkapado de modernaj muzikoj plenŝtopitaj je sintezilaj kaj aŭtomataj perfortigaj rekantaĵoj. Tute male Solo sciis ekspluati siajn aparatojn kiel armeo da diversspecaj muzikiloj; aldonante al tio iom da frapinstrumentoj, li sukcesis krei aŭ rekrei diversajn etosojn pli malpli laŭ popolmuzikaj skemoj.

Al tio li sukcese aldonis sian muzikspertan voĉon de juna esperantisto, kromigita de plena fido en la verkoj propra kaj de dr Zamenhof!

La enhavo de KosmoInfano ne esta elĉerpebla per ununura aŭskultado; fakte je unua kontakto kun la muziko de Solo mi kredis ke estas tie nenio ĉerpebla por mi. Sed post kelfoja priatento de la kvin pecoj, tiam mi komencis pli taŭge taksi kaj aprezi je pli justa nivelo la verkon de Solo!

Fakte, kiel mem diras Solo, Kosmo Infano ne estas Roko! Solo ne ludas Rokon. Sed tamen Solo ne estas malrokmuziko... Nek rokmuziko, kio do? Mendu, aŭskultu, ĝuu kaj sciu!



Bertrando



LA ROZMARIAJ BEBOJ



-Rok-gazet' : Jomo ĉu vi povas prezenti la Rozmariajn bebojn?
- JOMO: "la Rozmariaj Beboj" konsistas el tri muzikistoj:
  - el Rubio de la ganaderia de San Anders estas la drumisto, perkutisto kaj Ĥoruskantas.
  -Erik la Freneza Hundo ludas gitaron violonon, banĝon, akordionon, mandolinon, balalajkon kaj kantas.
  - Mi ludas basgitaron kaj kantas, mi nomiĝas Jomo aù Karol Kriglsztajn.

R-G :kial tiu nomo "la Rozmariaj Beboj"?
J :tio venas de la filmo. Erik la Freneza Hundo havis la ideon. Samtempe temas pri ideo de infaneco kaj diableco, estas miksaĵo de tiuj interesaj ecoj.
R-G : kiom aĝas la Beboj ?
J : mi estos baldaù 30 jara, la 10an de oktobro 91. La Rubio havas 3 jarojn pli ol mi kaj la Freneza Hundo 3 malpli.
R-G :de kiam la Rozmariaj ekzistas ?
J : ni estas du jaraĝaj ĉar ni naskiĝis la 5an de novembro 1988 je la 10a 30 vespere, dum nia unua koncerto en la unua parto de koncerto de "the Shifters" en Tuluzo.
R-G :kiujn muzikinfluojn havas la Beboj?
J : ni havas tre diversajn, feliĉe kaj kompreneble, ni aùskultas muzikon delonge antaù nia kuniĝo.
Ni ŝatas "la Ramonoj" (the Ramons), Chuck Berry, Popol muzikon kiel "the Pogues", la ĥorojn de la ruĝa armeo, Ivan Rebrov, la fratojn ĵak kaj kelkajn stultaĵojn kiel rokmuziko.
R-G : sed por ke ni havu pli precizan ideon pri via muzikstilo, ĉu vi povus tion klarigi ?
J : ni kreis nian propran stultan rok-stilon ĉar ni ne volas ke oni faru por ni, do pro tio ni kreis "Gliterpunk". Ĝi estas speciala stilo, ni estas la ununuraj ludantaj en tiu stilo, kaj kompreneble ni estas la plej bonaj !
Kiel mi diris ni ludas "Gliterpunk" sed ni estas influataj de "Etnosurf", tio estas alia stilo kiun ankaù ni mem kreis, jes ! jes!
R-G :en kiu lingvo vi kantas ?
J : ni kantas ĉefe en la franca sed en niaj kantoj estas multaj partoj en diversaj lingvoj kiel ekzemple, la serbo-kroata, baldaù estos ĉu serba, ĉu kroata, itala, nederlanda, jidiŝa, pola, ktp...
Sed ankaù ni havas kantojn en esperanto, ili ne estas originalaj. Ili estas tradukitaj el la franca.
Fakte ni devas verki originalajn esperanto-tekstojn por kanti ilin nur esperante ĉar kompreneble kiam ni ludas en Francio ni preferas kanti la francajn versiojn ol la esperantajn.

R-G :kiu komponas?
J : ni ĉiuj.
R-G :kiu verkas la tekstojn?
J :la francajn, ni ĉiuj kaj la esperantajn kaj alilingvajn, mi mem .
R-G :ĉu vi ĉiuj parolas esperante?
J : nur mi, "el Rubio de la Ganaderia de San Anders" lernas ĝin.
R-G :kial esperanto en viaj kantoj?
J : ĉar mi estas esperantisto; sed kompreneble kiam oni interesiĝas pri lingvoj kiel mi oni ne povas ne intersiĝi pri esperanto. Ni deziras ke esperanto estu pli konata. Mi opinias ke muziko estas unu el la plej bonaj rimedoj por ĝin konatigi.
R-G :ĉu vi planas kanti esperanto pli ofte ol nuntempe?
J : jes sed por tion fari ni devas havi proprajn kaj originalajn E-kantojn ne tradukitaj el la franca, tiel ni kantos rekte ilin esperante.
R-G :ĉu vi povas rakonti iom da historio pri la bando?
J : la Rozmariaj Beboj venas el du tuluzaj rok-grupoj : "the little helpers" kaj "la Fuĝintoj el Alkatraz". Ili ne plu ekzistas. "Erik la Freneza Hundo" kaj "el Rubio de la ganaderia de San Anders" ludis en la unua rok-bando kaj mi en la dua. Ni decidis starigi grupon kune, nia komuna celo estis ludi serioze ne-seriozaĵojn, ludi ĉiutage kaj kiel eble plej longe.
R-G :ĉu vi eldonis diskon?

WA TA TWA FA WA TA TWA FA GLITER PUNK

J : nia unua apero sur disko estis en la kompilaĵo "Maria ET" kun sep grupoj el Tuluzo, en tiu diskego estas du kantoj niaj kaj ankaù du kantoj de la "Fuĝintoj el Alkatraz" kiuj tiam ekzistis.
Poste ni estis eldonitaj en disketo kun tri aliaj bandoj far de la asocio "abus dangereux" (danĝera trouzo) kiu elsendas rok-programon en Radio FMR, eldonas fanzinon kaj produktas disketojn.
Sekvas "Vinilkosmo" (diskeldonejo de Eurokka), kiu eldonis disketon en kiu estas du el niaj kantoj en esperanto, sur la alia flanko estas du kantoj de Amplifiki. Tiu disketo ankoraù haveblas ĉe Eurokka.
Denove ni aperis en nova kompilaĵo de "Boucherie production" (buĉeja produktado) en kiu estas 12 francaj rok-bandoj ne konataj, inter ili estas ni per unu kanto.
Du el tiuj rok-bandoj estis elektitaj de la produktejo poreldoni diskegon kaj (kd) kompaktdiskon.
Do tiel ni sukcesis surbendigi diskegon kaj KD-on dum la festoj de Kristnasko 90.
Ekde marto 91 niaj diskoj troviĝis en ĉiuj grandaj francaj urboj.
Nur sur la KD estas esperanta versio de "Git Mir a sztikl sztrudl".
R-G :kiu signifas?
J : donu al mi pecon da ŝtrudel tio estas kukaĵo el centra Eùropo, la rekantaĵo estas en la jidiŝa, la gepatra lingvo de Zamenhof.
R-G :sur la KD estas la du kantoj de la disketo de vinilkosmo, sed en la franca versio. Temas pri "en Indiani" kaj "la kanto de la kavernulo"; multaj homoj preferas la E-version; ĉu vi konsciis pro tio?
J : jes ankaù oni diris tion al ni.
R-G :estas alia peco kiu nomiĝas "Varsovio", kial tiu kanto en havas la muzikmelodion "a las barricadas" (al la barikadoj), anarkiista kanto kiu famiĝis en 1936 dum la hispana revolucio?



El Rubio de la Ganaderia de San Anders

Vinilkosmo





J : tiu kanto temas pri la historio de Pollando, la unuiĝo de Germanio kaj la problemoj de la landlimo inter tiuj du landoj.
Tiu muzikmelodio ankaù estas varsovia.
Ni tre ŝatis tiujn du versiojn, por ni estas korafero.
R-G :ĉu ankaù pro tio sur la foto de la kovraĵo de via KD videblas objektoj en kiuj ni povas legi "CNT", "1936 la 19an de julio, hodiaù.
Barcelono : pafilojn por la hispanaj laboristoj!", portreton de prondhon, ktp.?
J : por ni estas tre grava parto de historio, politike kaj historie. La titolo de la KD kaj diskego estas vortludo "lutte de classe" (klasbatalo) kaj sur la kovraĵo vi vidas nin, ni estas en klasejo kaj ni batalas.
R-G :kial "Boucherie production" interesiĝis pri vi?
J : mi ne scias sed tio estis tre interesa ĉar ni serĉis diskeldonejon ne tro gravan sed sufiĉe por ni tiu diskeldonejo estis ĝuste kion ni serĉis; la rilatoj estas tre bonaj.
R-G :kion alportis al vi la KD kaj diskego?
J : mi opinias ke tio famigas nin ĉar ni ne estis konataj kaj nun dank'al reklamo far de la diskeldonejo mi multe koncertas. Tio ekzemple ebligis nin fari turneon kun fama franca rok-bando, "the Roadrunners". Tiu turneo en havas 45 koncertojn en tuta Francio dum du monatoj de la 2a de majo ĝis fine de junio 91.
Tiamaniere la rok-publiko malkovras nin.
R-G :ĉu vi pensas ke vi faros aliajn eldonaĵojn en la franca?
J : jes kompreneble, ni ŝatus, ni dezirus muziki kaj kanti dum almenaù 20 jaroj. Ni nenion scias pri estonteco.
R-G :ĉu vi sukcesas vivi per muziko?
J : nun jes, kaj krome kun ni estas sonteknikisto, temas pri Pierrot, li surbendigis la kompilaĵon "MARIA ET", la kasedon "esperanto ne konas landlimojn" de Amplifiki kaj la disketo de Vinilkosmo Nun li sekvas nin en ĉiujn niajn koncertojn.
R-G :kia estis la aventuro kun Vinilkosmo?
J : estis tre interesa sperto, la disketo aperis dum marto 90, ĝi estas konata en ĉiuj kontinentoj, eĉ du troviĝas en la esperanto-muzeo de Vieno.
Ni tre ŝatas la kovraĵon kiun faris Yves BARAT nia fotisto. La tri infanoj sur la foto estas la gekuzoj de la Freneza Hundo.
Tiu disketo famiĝis en esperantio.
R-G :ĉu tio alportis ion al vi?



Erik la Freneza Hundo

J : jes kompreneble. Antaù ol ni faru koncertojn por esperantistoj ili konas nin; tio gravas por ni.
R-G :la Rozmariaj Beboj ankoraù ne koncertis por E-publiko sed ĉu ci tion faris?
J : kiam mi estis en la "Fuĝintoj el Alkatraz" kelkfoje mi ludi sola sub la nomo "la Fuĝinto el Alkatraz", kaj tiel mi kantis antaù E-publiko dum diversaj aranĝoj en Tuluzo, Bordozo, Gresillon, en la IJK de 89 en kerkrade, en la IS en Neunmünster, en la Imur renkontiĝo en ostrava, en la E-kultur festivalo de Parizo.ktp...
R-G :ĉu la Rozmariaj Beboj planas, pli serioze kaj konkrete, koncerti en esperanto?
J : jes, kompreneble, kiam ni havos tutan E-repertuaron. Mi pensas ke pli kaj pli ni esperantigos kantojn sed ni ne nur kantos esperante, eĉ por esperanto publiko en kongresoj kaj renkontiĝoj, ni kantos ankaù itale, france, pole,ktp...
R-G :kion vi pensas pri la artikolo de Georgo KAMAĈO aperinta en nia n°1?
J : certe li pravas sed mi pensas ke ankaù ni faras erarojn en la franca, aùskultante diskon oni ne devas atenti nur pri tio.
R-G :ĉu estonte vi pensas pli bone verki la E-tekstojn kaj koncentas pri helpo de esperantistoj?
J : jes, jes, jes !!! Sed ni havas problemojn pro manko da tempo, sed ni sukcesos.
R-G :por konkludi, kion deziras la Rozmariaj Beboj estonte?
J : estonte ni ŝatus koncerti eksterlande en Eùropo, Pollando, Usono, kanado, ktp... Ni esperas ke iam ni povos, por ni gravas.
R-G :ĉu tiam esperanto ludos gravan rolon?
J : por ni estas la sama afero, esperanto estas tre bona vojo por komuniki kaj kanti eksterlande antaù esperantistoj kaj ne esperantistoj. Mijam tion spertis.

Intervjuis -FLO!-

" GIT MIR A SZTIKL SZTRUDL"

(Donu al mi pecon da ŝtrudel)

Panjo, mi faris turnojn mondajn
mi amis inojn blondajn
dum blankiĝis via har'

Panjo, mi dormis sub la pontoj
sed sub elsilkaj montoj
dum viaj noktoj de koŝmar!



Sed mi scias ke jen
tempo de la reven'
sen mon', kiel malsategul'
jen la fin' del' vojaĝ'
la reven' en vilaĝ'
kun la veno de larm' al okul'
(jidiŝa refreno)

Panjo, dum miaj turnoj teraj
tra la kurtenoj feraj
do restis vi en prostraci'

Panjo, nur la prapatra vivo
estis por mi motivo
sed mi revenas al raci'

sed mi scias ke jen...

"JOMO" Karol Kriglŝtajn.



STOP - PERSONE jus registris novan albumon. "EN LA SPEGULO" enhavas 9 pecojn. Kuneldonas Persone kaj la Ranetoj. Aĉetebla kaj mendebla ĉe EUROKKA - STOP - En IJK kaj UK probable ludos AMPLIFIKI kaj PERSONE - STOP - Malstrikta temo de someraj tagoj 91:"la plej bela insularo de la mondo" 12/14a de julio 91, Taivassalo, FINNLANDO - STOP - Temo de IJK: "MONDAJ MOVADOJ" 20/26a de julio 91, Karlskoga, SVEDIO - STOP - La plej internacia en Orienta Eŭropo... IJS; 01/07a de aŭgusto 91, Esztergom, HUNGARIO; kontaktu Szilvasi Laszlo & - STOP - PAC-KONCERTO okazos samtempe en pluraj urboj de Jugoslavio. Komence de Oktobro. Vidu adresojn de Nenad& kaj Betti& en la RETO. - STOP - Vizitu sud-Moravion okaze de la VINA SEMINARIO 12/15A DE SEPTEMBRO 91 (Č.E.J. Jana Burianova Smeralova 35, 62500 BRNO Ĉeĥoslovakio STOP - - STOP -



LASTMINUTE

-Aperos nova kasedo de Amplifiki dum aŭtuno 91 sub titolo "Ĉu ne?". Vi jam povas ĝin mendi ĉe Vinilkosmo.

-La kasedo de Ĵomart kaj Nataŝa "Folioj de mia memoro" haveblas ĉe Eldona societo Esperanto, Brunnsgatan 21 S-111 38 Stockholm aŭ ĉe Vinilkosmo (Vidu Eurokkaĵojn).

-KOSMO-INFANO, la disko de Solo haveblas ĉe AEU, Apt 864 E-29080 Malaga aŭ ĉe Vinilkosmo (vidu dorskovrilon de Rok-Gazet').Mendu ĝin grandkvante!!!.

URĜE

Kaj senprokraste ni volas peti vin iel helpi al unu el viaj kolegoj: Rok-muzikisto Popov Aleksandro, kiu nun troviĝas en speciala koncentrejo de MVD USSR(MVD=Ministerio pri Internaj Aferoj), kie, kiel li mem asertas, oni malsanigas lin, turmentas lin per diversaj drogaĉoj kaj diversmaniere detruas lian sanon. Oni jam multfoje skribis pri li al diversaj "instancoj", tamen laŭ ni, la realan helpon eble povus doni Rok-Gazet' legantoj, gekolegoj de Aleksandro el la tuta mondo. Eble reala "GLASNOSTj" en la demando estos la plej efika helpilo en la afero. Ekzemple, se muzikistoj kaj muzikemuloj el diversaj landoj skribos al li almenaŭ salutleterojn, poŝtkartojn, kaj tiel plu. La glacio moviĝos, kiel oni diras en nia lingvo. Tamen ni ne estas certaj ke lia nuna adreso estos konstanta, ĉar dum pasintaj du jaroj ĝi ŝanĝiĝis kelkfoje. Pro tio, eble, ni pensas ke la Moskva Junulara Esperantista Asocio povus kunhelpi, kolektante sendaĵojn por li. ((por POPOV A.K.)SU-117571 MOCBA, AMEM). NUN IOM PLI PRI LI





Popov Aleksandr Kuzmiĉ

Li naskiĝis la duan de aŭgusto milnaŭcent sepdekunu en urbo Taŝkent el Uzbekio. Ruso, sola kaj mezklera, li iĝas ekde milnaŭcent sepdekok diplomita instruisto pri ludo je seskorda gitaro kaj gvidanto de ensembloj. Li laboris en multaj urboj de Sovetunio: Kurgan el Uralo, Ivano-Frankovsk kaj Lvov el Ukrainio.

Kiel li asertas, li, dum deknaŭ jaroj(do preskaŭ la duonon de sia vivo) troviĝis en koncentrejoj de MVD USSR(Li estis jam arestita en milnaŭcent sesdeksep(nur dekses jaraĝa) en milnaŭcent okdek kaj en milnaŭcent okdekses pro politika alipensado, veraspirado, pro ideologia ribelado kontraŭ politmafioj de Taŝkento kaj tiel plu!!!)


Nun li troviĝas en speciala koncentrejo de MVD USSR en Nikolajeva regiono(Ukrainio) por malsanuloj de tuberkulozo. Kaj kiel li asertas, oni "speciale detruas mian sanon, uzante fortajn neŭroleptikojn: PARALIZOL, DIZERCIN, AMINAZIN, HALOPERIDOL, MEJEPTIL kaj tiel plu", ke oni neniigas lin kaj liajn skribpetojn kaj liajn aŭtorajn verkojn (versoj, kantoj kaj muzikaj verkoj) kaj rifuzas je medicina helpo.

(Tamen min atingis kelkaj liaj poŝtkartoj kaj leteroj kun notoj kaj versoj, kiujn mi forsendis al la adresoj indikitaj)

Aleksandr POPOV bezonas vian helpon. Skribu al li laŭ adreso de lia turmentejo tio estas: SU-329412, Nikolajevskaja oblastj, Snigirjovskij rajon,s.Centraljnoje IN-316/6 - 5 /tel: 2-72-96/



malrok-muziko



G. Brassens

ĈU VI KONAS GEORGES BRASSENS ?

Jes, vi eble jam aùdis pri li, vi aùdis lin kanti. Sed ĉu vi pensis iam lin ankaù aùskulti ? Dum "Promenado tra la lando de Oĉjo Georges" ESPERANTO-GIRONDE celis pliprofundigi la rilatojn inter Georges BRASSENS kaj la esperantistoj. Dudek-sep personojoj, kreitaj aù bildigitaj de la kanzonisto, prezentis plurajn el liaj facetoj. BRASSENS, homo, poeto, muzikisto, BRASSENS kaj la katoj estis la temoj de la unua parto. La dua parto reliefigis liajn ideojn : BRASSENS kaj la humilaj homoj, BRASSENS kaj la mortpuno, BRASSENS ĉu engaĝita kantisto ?,BRASSENS kaj la morto. Ĉiujn temojn ilustris (kompreneble!), surscenigoj, kaj atestoj; atestoj de la personaĵoj mem (La Dommastrino, kompatinda Martin...) aù de la publiko. (Marcel Ternant parolis al ni pri liaj kontaktoj kun BRASSENS, kaj klarigis kial li tradukis kelkajn el liaj kantoj). La publiko disponis pri la esperantigitaj tekstoj kaj estis invitata kunkanti. Tiel ŝvebis tra la salono amika spirito (Les Copains d'abord), kiun briligis Oĉjo Georges, ĉies onklo. Se ankaù vi deziras malkovri unu el la "neeviteblaj monumentoj" de la franca lingvo, ne timu kontakti min.

Marcelo REDOULEZ

Donjuan'

(tradukis Marcel REDOULEZ)



Gloron al la ŝofor', kiu bremsas sen fin'
Pro timo antaŭ mort de perdita bufin'.
Gloron al Donjuan', kiu ridis el kor'
Al ŝi, kiun neniu taksas laŭ valor'.

rek. : Tro malbelas ĉi knabin', mi volas ŝin !

Gloron al policist', dank' al kiu trafik'
La straton lasas al la katoj en panik'.
Gloron al Donjuan' pro lia rendevu'
Kun ŝi, kiu ne kovras paĝon de revu'.
Gloron al promenant' foriranta sen vort'
Dum triviala kant' krias : "ĝis mort' ! ĝis mort' !"
Gloron al Donjuan' pro lia amrakont'
Al ŝi, kiun flirtant' ne rigardas sen hont'.
Gloron al katolik', kiu de protestant'
Dum zelota masakr' fariĝas la savant'.
Gloron al Donjuan, kiu kisis kun ard'
Ŝin, kiun oni preterpasis sen rigard'.
Gloron al la soldat', kiu ĵus ĵetis for
Pafilon pro kompat' al ostaĝ' kun dolor'.
Gloron al Donjuan', kuspanto de subjup'
Ĉifita ne ĝis nun de seksavida lup'.
Gloron al monaĥin, kiu ja sen skrupul'
Malfrostigis en man' penison de kriplul'.
Gloron al Donjuan' briliginta sub lun'
Sciantan sidi nur ĉi pugon sen fortun'
Gloron al ĉiu hom', sen sankta ideal'
Faranta ĉion por ne ĝeni en real'
Gloron al Donjuan' virinigante ŝin,
Kiu sen li, horor' !, formortus virgulin'.

(Paroloj kaj muzik': G. Brassens)



Kantoj de Brassens dum kongreso de SAT-Amikaro en Amboise prezentitaj de Esperanto-Gironde.

Ideo ŝvebas en aero, la volo daŭre ŝvebi, kaj milda brizo turnas malrapidete la ideon, ĉirkaŭen, ŝajnigante, ke ni estas la ŝvebantoj. La okuloj fermiĝas, la lumo iĝas pli videbla, kaj ni fakte ŝvebas. Atentante, oni eĉ aŭdas muzikon sonantan kvazaŭ diste, sed, vere, tre proksime: ene. La rideton oni konstatas, kaj oni rimarkas, ke ĝi ĉiam ekzistis; foje kaŝe, foje sindone – sed ĉiam ekzistis rideto sur la lipoj kaj la aŭro kaj la korpo kaj la penso de tiu, kiu vivas sciante, ke la sento estas la esprimo de tiu ŝvebanta ideo...

Lante, ankoraŭ ŝvebante, ni sidiĝas. Trankvile, ankoraŭ okulfermite, ni rigardas pli atente tiun ideon, trovas pli bela tiun lumon, aŭdas pli klare tiun ene sonantan kanzonon... kaj ekskribas poemon.

Aerlumo

FLÁVIO FONSECA

Multaj el vi jam rimarkis la talenton de Flavio FONSECA (Flavju FONSEKA) en la muzik-aranĝoj de la kasedo "AARON Brazil-lumas esperante" produktita de AHOI (aŭ aŭdvida komunikado el Berlino en Germanio) kun la kantisto AARON Koenning (eksmembro de la mondanoj).
Flavio estas 27 jaraĝa kaj jam havas imponan karierhistorion kiu ebligis lian talenton konkretiĝi. Longaj studjaroj pri muziko alportis al li vastan konon en komponado, aranĝado kaj orkestrado.
Flavio ludis profesie en amaso da muzik-grupoj kaj kantistoj ĉu surscenejo ĉu en studio.
Li ne nur profesias sed ankaŭ artistas. Lia stilo estas nek "bosanovo" nek ĵazo sed alproksimiĝas al tio, por ke vi bildigu lian muzikon gravas ke vi konatiĝu kaj enmentu vin en brazilan muzik-etoson. Vole ne vole Flavio havas influojn de tiu etoso. Oni povus diri ke li situas en la nova generacio de komponistoj el Brazilo kiujn vi certe aprecas kiel ekzemple Milton Nascimento,Wagner Tiso, Antonio Adolfo, ktp...
Tiu nova generacio provas fari kosmopolitan muzikon sed serĉas inspiron en la radikoj de brazilaj regionaj ritmoj kiel Toninho Horta, Nauda Carneiro, ktp...
En liaj instrumentaj muzikoj Flavio FONSECA sukcesas miksi klasikan (Heitor Villa -Lobos) kaj eksperimentan muzikojn (Hermeto Pascal). Fakte la plej granda forto en la laboro de Flavio estas lia diverseco de stiloj.
La kasedo "Aerlumo" enhavas 9 pecojn, inter ili unu en la portugala "canto do forte" (kanto de la fortulo) kaj tri instrumentajn. La ritmoj de la kasedo estas relative lantaj, tamen tio ne forpelas la ĉarmon de tiu brazileca muziko.
Flavio ankaŭ havas valoron kaj kuraĝon eldoni diskojn kaj kasedojn sendepende (kvamkam la kasedon "Aerlumo" eldonis brazila esperanto-ligo).
Verŝajne la brazilaj diskeldonejoj troigas ĉar pli kaj pli da artistoj en Brazilo eldonas sendepende mem produktante.
Ni atendas senpacience lian venontan esperanto-produktaĵon, sed intertempe ni ĝuu "Aerlumon".

Okulojn fermi
kaj permesi aerlumvivadon...
En sesacon mergi sin,
ĝis senti en la viv'ian kisadon...
Do ridi per la man'
kaj ĉirkaŭ braki mondon!



Solange ARAUJO kaj Floréal

DISKOGRAFIO DE FLAVIO FONSECA

-"Flavio Fonseca" disketo memproduktita de Flavio en 1983 en Belo Horizonte.
- "Flavio Fonseca en esperanto" disketo produktita de Esperanto-asocio de Brasilia en 1985 en Brasilia (preskaŭ elĉerpita)
- "Luz do AR" diskego enhavanta unu esperanto-titolon memproduktita de Flavio en 1989 en Rio de Janeiro.
- "Aerlumo" kasedo esperanto-versio de "Luz do AR" produktita de Brasilia Esperanto-ligo en 1990.

PRI KAZAĤIAJ TROBADOROJ

Dum vintre 1990 Jomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ el kazaĥio vojaĝis ekster sovetunion.
En Svedio en urbo "Stockholm" la trobadoroj surbendigis kasedon en studio, sub titolo "fotoj de mia memoro" produktita de Eldona Societo-Esperanto el Stockholm.
Samtempe ili ĥorusis por la lasta kasedo de Amplifiki "Festoj de Kristnask'" (vidu Rok-gazet' N°1).
Sed tio ne estas iliaj nuraj produktaĵoj; kasedo estis eldonita de Lingvo en Hungario kaj kvartitola disketo sub titolo "Somera temp'" eldonita en Sovetunio.



Ĵomart kaj Nataŝa

Ili ne nur surbendigis sed ankaŭ koncertis, inter alie. Ili ludis dum lasta IS en Germanio, antaŭ reveno al Sovetio.
Jomart sendis al ni unu el siaj lastaj kantoj, kiun verŝajne vi povos kunkanti dum IJK en Karlskoga (Svedio) kaj UK en Bergen (Norvegio).

"Mi ne volas foriri"

Mi ne volas, ne volas
kial devas ni nepre disiĝi?
kio igas nin esti ne kune?
ĉu aùtuno?-aùtuno.

Kial do post nelongaj renkontoj
ni revenas al niaj postenoj
kaj en viv' aliiĝas nenio?
kiu scias? -nur dio.

Ĉu vi certas, ke devas obei
ni al sorto?
Ke jarordonon ne povos ni rompi?
ĉu mi trompas min? ĉu mi trompas...?

Jes, mi scias, ne ĉio dependas
en la mondo de nia deziro.
Viv' ne nur el renkontoj konsistas
ĉu mi pravas? -mi tristas.

Mi ne volas foriri, ne volas
min atendas senfinaj problemoj
scias mi, ripetiĝos nenio
ĝis revido -adiaù

Pri KAJTO en Amboise
46a SAT-Amikaro kongreso 31/03/91

Atentu ! jes atentu !
Tiu grupo estas danĝera : unue ĝi eldonas E-kompaktdiskon (jam afero suspektinda, ĉu ne ?), plie ĝi preparas jam duan, eĉ kian !
Se vi sukcesis ankoraù ne aùskulti KAJTOn, bone pripensu antaù ol ekpremi la startklavon de via muzikaparato. La unua aùskultado postlasas en vi komence ŝoka miriga sento; ĉar ni (la E-publiko) ne kutimas tion. Tamen jam kaptis vin la "re-emo", kiu ebligos al vi iom post iom gustumi kaj ĝui la multfacetan talenton de la kvar grupanoj. Kzazaù nova E-malsano, la melodioj, la instrumentoj la ritmoj, la voĉoj kaj la tekstoj penetros en vin, kaj la nura kuracilo estas...denova aùskultado.
Jam grave infektita de tiu "kajtjukado" mi spektis ilian surscenejan prezentadon. Jam de la unuaj notoj la spektantoj estas



pro admiro projekciitaj funde de siaj seĝoj, kvazaù ili sammomente ekflugus laù la sonrapideco. Kaj tiel ili restos ĝis la lasta kanto, kiu abrupte jam alvenas. Kvazaù post subita bremsado ĝi lasas nin nun falintaj el la seĝoj...surgenue!!!
La bis-krioj kaj la longaj aplaùdadoj montras nur iomon el nia ŝtorma interno. Longan tempon ni ankoraù bezonos, antaù ol vere digesti, kion Ankie, Marian, Marita kaj Nanne vorigis al ni. Blinde ni nun pretus sekvi ilin



ĝis ilia venonta prezentado. Mi esperas, ke almenaŭ ili konscias pri la spuroj, kiujn ili lasas en ni. E-o bezonas tiajn grupojn, (certe pli ol ili nin), kaj mi daŭre timas, ke ni neniam sukcesos kompensi iliajn klopodojn, dediĉojn, laborhorojn...ilian ARTON!!! Al KAJTO kuraĝon, gratulojn kaj dankojn.

Marcelo REDOULEZ

Kajto eventa
Kajto enventa

Antaŭnelonge mi havis bonŝancon spekti koncerton de **Kajto** ĉi tie en Tuluzo, kien ili venis post sia triomfego en Amboise. (Vidu apude.)

Komence ĉeestis kvardeko da fideluloj. Poste alvenis nemalmultaj ge-amikoj de Flo. Ja la indikita komenchoro, 20.30, estas tro frua por rokuloj kie ajn, des pli en Tuluzo!

Interalie ĉeestis la prezidanto de la Akademio de Esperanto. Tio ja montras la altan tonon de la vespero.

Mi ne scias ĉu oni gajnis iom da mono per tiu ĉi koncerto – ŝajnas al mi ke almenaŭ la duono havis senkostajn invitilojn. Mi scias ke esperanton ni ne lernas por riĉiĝi, sed mi supozas ke **Kajto** volis povi pagi sian vojaĝon de kaj real Nederlando.

Mi konfesas ke temas pri mia unua viva sperto kun **Kajto**, kvankam mi aŭdis pri ili dum jaroj. Mi estis agrable surprizita de ilia granda profesieco. Ili perfekte majstras la scenumon, neniam estas «morta minuto». Ili evidente ŝategas sian laboron – ni povus uzi esprimon «infekta entuziasmo». Ilia kantstoko estas iom malfacile klasebla – baze temas pri folklora muziko, sed kun forta dozo da varieteo. Do ĝi eminente taŭgas por miksita publiko. Kaj la muziko eminente laŭas la kant-temaron: maristoj, infanoj, kaj problemoj de la moderna socio.

Ili ĉiuj kantas kaj ofte ŝanĝas instrumentojn. Marita, altulino, ludis flutojn, dum Marian, sufiĉe malalta, ludis grandan akordeonon. Ankie preferas gitaron, kaj dume prezentis la programerojn, unue en esperanto, poste en tre ĉarma franca lingvo – ŝi ja estas instruisto pri la franca. Nanne, kiu komponas, ĉefe ludis banĝon – kaj, nu, li ne nanas.

Ilia kontakto kun la publiko estis unuaranga. Ili ne nur kantigis nin, sed spektaklofine dancigis nin pri frisaj popoldancoj. Tion ni povas nomi «totala spektaklo», kiam partoprenas ankaŭ la spektantoj.

— RoKo



"Live" – surscenejo en Tuluzo

Post Tuluzo, nia fluganta Kajto prezentiĝis en Laroque d'Olmes, Montpellier, kaj Limoges. Jen mallongaj raportoj el Laroko kaj Limoĝo.

- **Kajto, aŭ la «manoj nigraj»**

Vendredon la 5an de aprilo. Koncerto je la oka kaj duono. Rendevuo antaŭproponita je la kvina inter la grupo Kajto kaj la limoĝaj esperantistoj.

Je la sesa, neniu. Kelkaj personoj jam alvenis en la spektaklejon. Je la sepa... ni aŭdis bruon de motoro. La dudek ĉeestantoj eliris por akcepti kaj aklami la esperantistan grupon... sed estis nur buseto da spektantoj.

Je la oka, neniu Kajto en la ĉielo. Kion fari por la okdek ĉeestantoj paceme atendantaj?

Je la oka kaj duono spiregante finfine alvenis la fama grupo. Ili estis tre lacaj kaj iliaj manoj estis nigraj, ĉar post pluraj haltigoj ili pene sukcesis veturi.

Malgraŭ tiuj problemoj, sin lavinte la manojn, tuj ili magie muzike mirigis, ĉarmis, ridigis, kaj dancigis ĉiujn spektantojn.

— Isabelle Jacob

- **En Laroque d'Olmes alte flugis Kajto.**

Unue je la 18a horo, antaŭ dekduo da infanoj. Ĉiuj kanonis kaj farandolis ĝoje.

Poste ili prezentis antaŭ kvindeko da eksinfanoj koncerton riĉan je la sonoreco kaj ritmoj de sia duobla frisa kaj nederlanda kulturo (tria, aldonante la internacian). Dum paŭzo oni organizis eĉ tombolon, kies unua premio estis tutnature... ilia unua en esperanto ko-disko.

— koncizigegita laŭ raporto de Jorgos.

- **Forflugas Kajto**

Adiaŭonte, Kajto volas memorigi ĉiujn ke ĉe siaj koncertoj ili prezentis grandan parton de sia dua ko-disko, kiu aperos verŝajne antaŭ la somerferio. Ĝi nomiĝos **Procesio multkolora**. Naŭ kantoj temas pri vojaĝanta pupteatro, dum la aliaj naŭ havas diversajn temojn, ekzemple la maron.



rokgrupo
ALIBI

aŭ «Tio, kio iras en la kapon»

La naskiĝloko de la grupo Alibi estas konata: malgranda apudmoskva urbeto Dubna, situanta je du veturhoroj rektnorde de la moskva cirkla aŭtovojo. Ĝ estas verda, komforta, kaj tute ne provinca: en ĝi lokiĝas la Internacia Fizika Centro de la landoj apartenantaj al la Soveto de Ekonomia Interhelpo. Tamen en la grupo neniu iel rilatas al scienco. La ĝustan daton de naskiĝo nun estas malfacile eltrovi: la akuŝo okazis kaŝe, kun kunpremitaj dentoj pro malico kaj senpacienco, sen iuj atestantoj.... La gvidanto kaj organizanto de la grupo, Sergeo Popov, havis fortan bazon por antaŭtimoj pro antaŭnelonga evento: laŭ cela ordono desupre, lokaj registaroj kaj partiaj instancoj eksufokis fondiĝintan Fajrobirdon – produkton de dekjara streĉa penado.

Nekredeble, sed estas vero: Fajtobirdo surbendigis tielnomitan en Sovetunio «sonbendalbumon»,[1] kaj post ioma tempo la lando mergiĝis en funebron: la vica «ĝenseko» (Ĝenerala Sekretario de Komunista Partio) eklokiĝis malantaŭ la Maŭzeolon.[2] Tiel okazis trifoje. Eble dank' al tio, aŭ al io alia, tamen finfine la gvidanto de la grupo post multnombraj kaj multfojaj komisionoj kaj klarigstudoj; enketoj en la ŝtatorganoj en Moskvo kaj surloke; traserĉoj laborloke kaj hejme; forpreno de muzikbendoj kaj korespondaĵoj kun admirantaro, kaj de parto de la muzikaparataro kaj notlibroj (oron kaj juvelaron oni ne trovis); post akuzleteroj al la Centra Komitato de la Komunista Partio de USSR de ĝis nun nekonata aŭtoro; post ĉiuj ĉi maltrankviligaj travivaĵoj, Sergeo Popov estis vokita al kabineto kun firme kurtenitaj fenestroj. Tie iu prenis paperfolion kaj desegnis cirklon kaj per linio dividis ĝin je duonoj. En la unuan li skribis «KGB» (Komitato pri Ŝtata Sekureco), kaj en la alian li skribis «MIA» (Ministerio pri Internaj Aferoj). Post tio li ombrostrekis la unuan duonon per krajono, dirante: «**Tiu ĉi** parto ne interesiĝas pri vi, sed **tiu ĉi**, ankoraŭ jes.» Kaj al la muzikisto, konsternita pro la konspiro, estis proponita tri aferoj, tamen ne laŭelekte sed amase: ne gvidi ekde nun iun rokgrupon, ne uzi la nomon Fajtobirdo, ne plu verki muzikon! Kontraŭparoli estis malutile kaj interkonsenti signifus esti pli malsaĝa ol la interparolanto.

Dum vespero en fidindan loĝejon estis transportitaj la persona parto de la muzikaparataro de nun sennoma grupo, kaj la neforprenita parto de sonbendoj kaj paperoj kaŝitaj ĉe amikoj. Kaj la eksgvidanto fariĝis asekuragento. La ĉambro en la Kulturpalaco Oktrobro kie estis bazita Fajrobirdo, estis fordonita al per nenio makulinta sin fotoklubo. Je tio finiĝis malfacila jaro 1984.

En printempo de la jaro 1985, Sergeo Popov partoprenis festojn de leningrada rokklubo. Nun mallaŭte kaj poiomete komenciĝis Perestrojko, sed ĉe la enirejo de la halo kie komenciĝis la stela horo de rokgrupo Alisa, milicistoj ankoraŭ traserĉis sakojn, ruinlumigis fotobendojn, kaj atentflaris la narkotan «herbeton». Ekscitita per la leningrada «tusovko»,[3] Sergeo provis revivigi Fajrobirdon, sed la provo estis ĉesigita (pri tio oni aŭskultu la kanton **Lubino-de-Klubo**).

Jen en la komenco de 1986, ili sukcesis lokiĝi en uzina limigitula[4] amasloĝejo ĉe la loka diskoteko. Ili decidis ne reveni al la nomo Fajrobirdo malgraŭ tio ke duono de la kvara sonbendo estis preta kaj finpure kunigita. La kantoj de la dujara deviga interrompo kvalite malsamis al la sufiĉe senribela repertuaro de la mortinta grupo. Kaj ankaŭ la nova Ĝenerala Sekretario tiom fidoplene ridetis de televidekranoj, ke humanismaj konsideroj naskis la decidon komenci novan projekton kaj nomi sin Alibi.

La grupo konsistis el neŝanĝita de tiu tempo membraro: Sergeo Popov, vokalisto, gitaristo, aŭtoro, kaj gvidanto; Aleksandro Rjabov, basgitaristo kaj vokalisto; Mikaelo Tiĥomirov, drumisto. Aleksandro unue manprenis basgitaron, Mikaelo dum kvin jaroj en instituto plene malkutimis je drumoj kaj svingis per tamburvergoj kvazaŭ per hakiloj. Estis iomete terure, sed ili ekkomencis. La tempo de provludoj estis rigide strekmarkita de domadministrantino. Malantaŭ la «ruĝa anguleto»[5] en kiu ili provludis estis bufedo kaj la bufedmastrino, ekaŭdinte «maŝinpafilan pafadon» de la malgranda drumo, ĉu eraris pri la «deko» (dek rubloj), ĉu faligis

1. Dum multaj jaroj en Sovetunio ekzistis ununura diskproduktanta ŝtata firmao, kaj novaj rokgrupoj havis tute neniun eblecon eldoni diskojn. Do naskiĝis agado de «sonbendalbumoj». Antaŭe kaj ĝis nun ŝatantoj povas aŭdi novan rokmuzikon pere de sonbendoj.

2. Malantaŭ la Maŭzoleo de Lenin sub la muroj de Moskva Kremlo oni enterigas la plej eminentajn membrojn de la soveta registaro.

3. «Tusovko» estas slanga vorto por amasiĝo, renkontiĝo de samideanoj por kune trapasi tempon.

4. En Sovetunio oni devas havi en siaj pasportoj stampon, ke ili loĝas en specifa loko; ŝanĝante loĝlokon oni devas ricevi novan stampon. En grandaj urboj oni ne rajtas libervole elekti nek ricevi stampon. Tamen kelkaj entreprenoj havas rajton preni laboristojn de aliaj lokoj por sia entrepreno, laŭ limigita kvanto. De tio venas la vorto «limigitulo» – persono kiu laboras laŭ kontrakto, loĝas en uzina amasloĝejo, kaj ne havas konstantan loĝpermeson.

5. En ĉiuj ŝtataj entreprenoj, institutoj, lernejoj, kaj ĉi tie en amasloĝejo oni havas politikpropagandan ĉambron kiu nomiĝas la «ruĝa anguleto».

"Juna estas tiu, kiu sentas sin tia..."

LA PLEJ INTERNACIA
en Orienta Eŭropo . . .

01 - 07 aŭgusto
Esztergom
(Hungario)


Aliĝu ĉe
LINGVO-STUDIO
H-1675 Budapest Pk. 87.



kaldronon kun teo. Malgraŭ tio, kaj ankaŭ malgraŭ ĉefa laboro, ekzisto de tri edzinoj kaj kvar gefiloj, k.t.p., post unu jaro la grupo jam havis sufiĉe vastan repertuaron, koncepton, scenan ludaspekton, kaj deziron koncerti. En printempo 1987 ĝi sukcesis gajni la simpation de la loka tre postulema kaj kaprica publiko en tiutempe moda «Muzika Ringo»[6], kaj ankaŭ enfluigi buntan aron de la Moskva Roklaboratorio.

Dum la ĉiujara festivalo de ĉi tiu gaja (malgraŭ la ŝtat-oficialeco) rokgruparo, Alibi komencis sian ludon per bluso dediĉita al la evento, kaj por la unua fojo bone prezentis sin al moskvaj rokuloj: punkoj ne malicŝercis, metalrokemuloj ripozis, kaj posthipioj anim-aŭskultis la voĉon de sia komunavo Sergeo Popov kiu marŝis en vaste kolorigita ĝinzo jam en '67.

En junio, trabatalinte du antaŭetapojn, Alibi ludis en la finala koncerto de la regiona konkurso Rokaŭtografo '87 en urbo Voskresensk. Treege plenigita halo de Sportkomplekso Kemiisto adiaŭakompanis ilin. La juĝantaro, komponistoj rekonataj en Sovetunio, aljuĝis al la grupo venkon «pro evidenta supereco». La ĉefa premio de la festivalo estis turneo tra Bulgario, kie la tiuepoke tre piprita kanttemaro de Alibi evidente ne taŭgus al la Ĵivkov-reĝkortego. Tiam la organizantoj konstruis kompromison: al la suda bordo iris «ripozi» metala Stalker, dum la grupo Alibi estis direktita... al Kamĉatko por la komsomola agitturneo sur ŝipo Korĉaginec. La vojaĝo okazis en novembro kaj la muzikistoj havas multon por memori la Pacifikon: 8-gradan ŝtormon, «ruĝan» fiŝon, kaj la guston de 50-rubla vodko.[7] Kaj la fiŝkaptistoj por kiuj koncertis Alibi, verŝajne ankoraŭ nun memoras la kantojn de tiuj stranguloj vestitaj en grizaj uniformoj kun kabalaj signoj surdorse. En ilia vivo tio estis la unuaj forte grakantaj korvoj de Perestrojko.



En septembro la grupo Alibi ludis dum la fama «heroa» festivalo Podolsk '87, kiu signifas por soveta rokmuziko tiom, kiom por la okcidenta signifas Woodstock. Kaj Alibi gajnis 2an premion. Verŝajne tio estis la plej bela kaj arda ekflamo de la historio de soveta roko. Tiu, kiu estis tie, ĉiam memoras: estis tiom da libero, kiom da aero enbruste; trimila aŭskultantaro malfermita al ĉielo kaj pluvo, plene elektrita – ĉiu sukcesa linio trastebis ĝin unuanimen, kaj la muĝo ekstaris kiel Himalajo; feliĉaj pro ĉio okazanta, la muzikistoj malvolonte cedis sian lokon unuj al la aliaj; konsternitaj milicistoj verŝis malicon; lokaj «luberoj»[8] kaŝis sin malantaŭ aliaj dorsoj, atendante sian noktan fervojhaltejan horon; malseka muĝanta Ŝevĉuk kaj drinkinta Butusov[9] vagadis tra la sanatoria urbeto kie noktumis la tuta rokfrataro. Tio ĉi estis, estis, forestas....

Krom la 2an gajnlokon kaj malgrandan monpremion, la grupo Alibi ekhavis en la urbo Podolsk sian estontan manaĝeron-nutranton Boris Gorbunov. Li estis invitita en la grupon post kiam li tute senpage sukcesis manĝigi en amasmanĝejo grandan grupon de hipioj. Evidentiĝis ankaŭ ke almenaŭ kvarono de la aŭskultantoj partoprenis la festivalon dank' al lia «trapasilo» kaj denaska aroganteco.

6. «Muzika Ringo» estas la nomo de televidprogramo dum kiu muzikistoj troviĝas en la mezo de halo (ringo), ludas, kaj poste ĉeestantoj demandas ilin pri ĉio ajn plej provoke kaj malice.


7. En tiu tempo vodko kostis 5 aŭ 10 rublojn, sed en tiuj ĉi kondiĉoj ili devis aĉeti ĝin nur ĉe spekulantoj.

8. La vorto devenas de la nomo de apudmoskva regiono. Junuloj tie okupiĝis pri kulturismo, kaj venante al Moskvo kaptis punkojn, metalrokemulojn, kaj aliajn alipensantojn kaj forbatadis de ili «animon».

9. Ŝevĉuk estas la gvidanto de la grupo DDT kun akre socia kanttemaro. Butusov estas la gvidanto de la grupo Nautilus Pompilius de Sverdlovsk.







En decembro okazis partopreno en «Rokpanoramo». Simpleco, energio, malico de ludado alportis al Alibi sukceson ne nur ĉe la okmila aŭskultantaro en Luĵniki[10] eksplodinta dum la lasta kanto; la grupo ricevis multajn proponojn pri turneoj, koncertoj, filmoj, intervjuoj, ktp. La gazetaro prodigis al la grupo komplimentojn, kaj niaj muzikistoj eksiĝis de la antaŭaj laborpostenoj -- baldaŭ en la lando ekestis unu asekuragento, unu konstruinĝeniero, kaj unu MIA-oficisto malpli. Komenciĝis aktiva turnea vivo: la grupo Alibi vizitis dekojn da urboj kaj faris centojn da koncertoj. Ilia viv-nivelo altiĝis, ili poiomete akiris bonan ludilaron, kaj eklernis samfacile orientiĝi ĉe restoraciaj manĝokartoj, tiel de labora Komsomolsk-sur-Amur, kiel de altklasa dolĉaĉa mafia Ĵitomir. En Moskvo koncertoj de Alibi estis filmitaj kaj dissenditaj per BBC, NBC, nederlanda, kaj pola televidoj: laŭ bonaj tradicioj de la «Malbenita Okcidento», la rigora scena ludaspekto de la grupo estis uzata por reklami diversajn muzikajn ilojn.

Foje eĉ la Centra Televido de USSR decidis kontrakti la grupon por la muzika zoo sub titolo «Ni ekkantu, amikoj». Tie estis plena aro de diversstilaj muzikistoj: spektantoj diskutadis kaj muzikistoj drinkis ĉe la bufedo.

En septembro 1988, la grupo Alibi la lastan fojon partoprenis konkursan festivalon. Dum ĉiuj antaŭaj ili ĉiam fariĝis ĉu gajnintoj, ĉu laŭreatoj (speciale ial en Belorusio). Denove tio estis loka «Rokaŭtografo», denove la grupon gajnis la unuan lokon, denove la ĉefpremio estis vojaĝo eksterlanden (ĉifoje ĉeĥoslovakien), kaj denove la grupo nenien veturis. Plena neatendaĵo por jam maturiĝintaj rokuloj estis la atribuo al ilia grupo de la premio de Moskvoregiona Komsomolo. Jam perdiĝintaj pro tio ke ili estis la unua rokgrupo honorigita de tiu laŭreata nomo (iom poste la saman tutunian premion ricevis Nautilus Pompilius), niaj muzikistoj donis la tutan ridindan monsumon al «Memorialo»[11].

Malgraŭ ĉio ĉi, en sia propra hejmloko la grupo Alibi ne havis iom tolereblan provludan bazon. En la amasloĝejo oni donis nur du matenajn kaj vesperajn horojn -- dum ne funkciis la bufedo --, kaj ili devis provludi ĉu en restoracia kelo, ĉu en stadiona suplementejo, ĉu entute ne provludi. Fin-fine en la komenco de 1989 ili sukcesis lui de la loka Profesi-teknika Lernejo pli-malpli taŭgan ejon je 500 rubloj jare. Dum tri monatoj la muzikistoj segis, rabotis, ĉizis, kaj kovris la mizeran murtapeton per speciala sonizola materialo okaze aĉetita de la eksedzino de konata komponisto. En aprilo ili festis bruan enloĝiĝon. Iam samtempe en la manojn de la muzikistoj trafis 4-kanala «Akai», modelo de ĉirkaŭ la jaro 1974. Do venis tempo por sumigi trijaran laboron kaj fiksi por la posteuloj ĉion kio estis ludita, ellernita, kaj projektita.

Saŝa (Aleĉjo), Miŝa (Miĉjo), kaj Serjoĵa (Serĉjo) dividis la tutan repertuaron laŭ tri pli-malpli egalaj partoj laŭstile. Rifuzinte turneojn, tusovkojn, eĉ renkontiĝojn kun amikoj, ili longege malaperis en la studion, volvitaj per kabloj kaj mikrofonoj kvazaŭ per kristnaskabiaj ornamoj. La somero estis varma, biero akirebla, enigmaj inoj vicadis en galanterivendejoj -- ili tion ne rimarkis.

Dum duono de jaro, Alibi laŭvice surbendigis tri sonbendojn, kaj duono de la kantoj estis redaktita, ellernita, kaj eĉ reverkita. La labortagoj de la muzikistoj komenciĝis kaj finiĝis je preskaŭ la sama horo; la tabloj kaj fenestrobretoj estis plenŝarĝitaj per malplenaj kafujoj kaj kukurbetaj pastkukoj; pantofloj kuŝis ĉe la instrumentoj. Noktaj ĝemkrioj de vokalistoj ludantaj en auskultiloj, komencis eksciti la ĉirkaŭan socion. Iumomente forte kaj ofte ripetataj kantvortoj (speciale **«"tiras" niajn inojn kartveloj»** kaj **«kisas la lipojn ŝiajn en la kavaĵo de kverko ŝia»**) elvokis kontraŭon flanke de la patrinoj de special-tekniklernejaj studentoj. Sed la konflikto rapide estingiĝis en la fluo de ĉarmo de la muzikistoj.

Kaj jen ĝis la komenco de decembro estis surbendigita kaj kunmetita ĉio kio iris en la kapojn tiumomente. Kaj se la sesio de la unua albumo **Ŝiŝel-Miŝel** daŭris 2,5 monatojn, **Ĉi tie kaj nun** daŭris unu monaton, kaj **Oni pagu pro ĝojo** nur du semajnojn. Je la datlimo la prunteprenita magnetofono estis redonenda al ĝia malavara posedanto. Kaj la mono elĉerpiĝis iam en la mezo de la forloga vojaĝo en aŭskultiloj -- ĉiujn malgrandajn monkonservojn formanĝis bendoj, efektoj, ktp. Kaj foje tion faris restoracio Ankro antaŭ la koncerto de Pink Floyd.


Kaj iam en la mezo de decembro niaj muzikistoj reatingis la realan mondon kaj ĉirkaŭrigardis. Evidentiĝis ke sur tiu preciza loko kiun ili kun siaj samideanoj kun tiom da



10. Luĵniki estas unu el la grandaj moskvaj stadionoj kie oni ofte okazigas koncertojn.

11. «Memorialo» estas neformala (t.e. neŝtata) societo kiu laboras por diskonigi al la homaro la persekutojn kontraŭ la popolo dum la stalinisma periodo, kaj rerajtigi mortigitojn kondamnitajn pro ĉiuj eblaj kaj neeblaj teruraj pekoj.







peno kaj malico dum du longaj jaroj purigis de ĉiu muzika fiaĵo, nun baziĝis aliaj tute samaj sed multe pli junaj kaj arogantaj: Aŭtobuskondukistoj aŭskultadis **Blankajn rozojn** (popstila kanto kiu havas tute nenion komunan kun muziko -- pri tiu kanto kaj la grupo Afabla Majo ekzistas multaj klaĉoj, ktp.). Iamaj potencaj kromedzinoj de rokuloj eltordis naztukojn kaj pantalonetojn dum koncertoj de polurita Ĵenja Belousov kaj kosme primitiva Afabla Majo, kie la voĉo de Razin similis la sonon de malfermata konservujo. Ĉe televido disdonis intervjuojn oligrofrena Roma Ĵukov. Al kolektivaj koncertoj de la tuta centrigita moskva regiono alveturis en luitaj aŭtobusoj lernantinoj 12-13-jaraĝaj. Rok-tuskovoj tute malaperis kvazaŭ ili estis forprenitaj militservi kaj malaperis en malproksima militiro. La tuta restinta homaro apogiĝis je Jelcin,[12] je Interregiona Grupo,[13] kaj je «Memoro»,[14] kaj persiste foraĉetadis provizojn de sapo, tapiŝoj, kaj mercedesoj. Kaj nur la «akjno»[15] de perestrojko Coj[16] ankoraŭ elmontris «rodenajn» pozojn en junularaj programoj de la Centra Televido, kaj Ŝevĉuk kun sia karakteriza artismo transformis foje glasnoston je arlekenado, foje arlekenadon je glasnosto.

Subite laŭ la leningrada televido oni ekvidis B.G.[17] Li brilis kun nova eklezia barbeto kaj insultis senspiritan Amerikon, «flavan» gazetaron, kaj ateismon. Io okazis. Butusov faris ion pri kio neniu ion bone sciis, kaj faris jam delonge: penegis. La cetera malpli eminenta rokfrataro travivis per malgranda spekulado por vivteni amatajn virinojn kaj gepatrojn. Difiniĝis finfine ke pro amo oni pagu: filmado, artikoloj, reklamo, klipoj, intervjuoj, turneoj, ktp., kostis tiom da mono kiom Alibi de la komenco ne havis.

12. Boris Jelcin estas la prezidanto de la rusianda parlamento kaj estas homo kiu la unua kaj sola konfrontis la kontraŭpopolajn tendencojn en la politiko de Gorbaĉov.

13. Grupo de sovetiaj parlamentdeputitoj kontraŭantaj la maldemokratiajn kaj kontraŭpopolajn decidojn de la gorbaĉova registaro.

14. «Memoro» estas oranizo batalanta kontraŭ semitismon (ne kontraŭ judoj) kies sistemo batalas por ruinigi rusan kulturon.

15. Popolkantistoj en Kazaĥio en malnovaj tempoj; ili estis batalantoj por popola libereco.

16. V. Coj estis la gvidanto de leningrada rokgrupo Kino, pereinta en aŭtuno 1990.

17. B.G. estas Boris Grebenŝĉikov, unu el la plej eminentaj kaj rekonataj sovetiaj rokuloj.

Rokmuziko fariĝis Granda Muto.

Lavango de Protesta Stebo malaperis en la Kanjonon de Glasnosto.

Venis la tempo de Vera Laboro.

Labortago de la rokgrupo Alibi komenciĝas je la **10**a horo. Pro **15**-minuta malfruo oni devas pagi **3**-rublan monpunon, **30** minutoj -- **5** rublojn, **1** horo -- **10** rublojn, pli ol horo -- **25** rublojn. Registri malfruojn devas Popov. Lastatempe tio forprenas de li malpli kaj malpli da tempo....

-- Andreo Orlov

Aliĝu ĉe : *Hanna Hjelt, Stålarmsg. 34 D 8, SF-20810 ÅBO, tel. +358-21-354169*

LA KVALITON GARANTIAS FEJO.

Fejiro invitas al SOMERAJ TAGOJ DE FEJO!

ST'91 ST'91 ST'91 ST'91 ST'91

TAIVASSALO, FINNLANDO

12-14 julio 1991

Estas bonega renkontiĝo!

FEJIRO

MALSTRIKTA TEMO: "La plej bela insularo de la mondo"

Aliĝu ĉe

La 47-a IJK, Box 4278, S-102 66 STOCKHOLM



La 20-an ĝis la 26-a de Julio 1991

Karlskoga, Svedio

TUTE NE GRAVAS

<u>*REAGE AL REAGOJ*</u>

Ne estas mia intenco pravigi la akremon de Georgo Kamaĉo en la recenzo "Tute ne gravas", en 1)18, nek malpravigi la defendajn argumentojn de Bertrando Albault en 1)19. Tamen tiuj artikoloj pensigis min pri kelkaj ideoj.

Kantataj tekstoj ankaù estas literaturo, eĉ pli asimilebla por la ordinara publiko. La melodio helpas popularigi poeziajn verkojn, ne gravas ĉu temas pri roko aù lirika peco; ĝi iĝas ilo por tekstojn diskonigi... rare oni tute relegas bonan libron, dum kutime oni plurfoje reaùdas diskon aù kasedon.

Kompreneble, la muziko devas esti bonkvalita. Bona komponaĵo povas ŝminke "savi" neperfektan tekston, kaj komponaĉo senkompate murdas eĉ majstran verkon. Same, verkanto de teksto specifa por muziko ne devas misatenti kelkajn regulojn. Mi ne parolas pri rimo kaj metriko, kiuj estas elementoj uzindaj aù ne, depende de la stilo, kaj tio estas persona afero. Tamen, prozodio kaj gramatikaĵoj nepre neforgesendas.

Tio ne signifias, ke nur veteranoj rajtas verki, sed, ke oni valorigu revizion antaù ia ajn publikigo. Se oni deziras disvendi pretan produkton, tia korektemo iĝas respekto al aĉetontaro.

Do, ĉiuj, komencantoj aù ne, verku, verkadu, pliriĉigu nian muzikan E-kulturon! Sed zorgu, faru kiel eble plej bonan muzikon, uzante ĉiam bonan Esperanton!

FAVIO FONSECA

Al Rok-Gazet'

Lisbono, 1991.05.18

Estimataj:

Jam antaŭ multaj semajnoj, ĝojsurprize mi ricevis n-ron 1 de via gazeto. Mian reagon vi povas aprezi per la ĉi-kuna artikolo, kiun mi verkis por la bulteno de Portugala Esperanto-Asocio (kiun cetere mi redaktas) kaj per la tujeco de mia abono. (Pri la maltujeco viaflanke sendi n-ron 2 kaj la diskon... nu mi scias ke tiuj organizaj taskoj estas tre komplikaj kaj tial mi ne plendos!)

Nun, mi volas prezentegi al vi mian plej sinceran gratulon pro via bonega laboro kaj danki ankaŭ la maloftan eblecon diri tion ĉi sincere...

Ĉi-laŭdoj ja ne signifas ke mi ne trovis kiun ajn mison en Rok-Gazet - sistema anstataŭigo de "ĵus" per "ĝus" en cetere bonega novelo de Bertrando (paĝoj 15 kaj 16) estis sufiĉe ĝena, dankon - sed kritiki troe pro malgranda (eĉ se ne malgrava) detalo estas laŭ mi kontraŭefika: ĉar se oni tropostulas absolutan perfektecon, oni neniam atingas ĝin, ĉar ĝuste la miso estas la vojo al la trafo... Kaj en tiu senco mi tute apogas la ĉefredaktoran reagon al la tro spicita kritiko de Kamaĉo.



Tamen mi ne povas deteni min reagi al io kio sufiĉe muite ĝenis kaj agacis min en la numero 1 de Rok-Gazet'. Ja tuj en paĝo 3-a, Flo tutprave alvokas nin kontraŭ la milito; ne nur la Persgolfa sed... Ne!, al ĉiuj militoj! Bonege! Mi aplaŭdas tion stare!

SED... Kial do diable oni trovaĉas sur paĝo 7-a?! Bildon pri ulo kiu altege tenas... ja, armilon! Hommortigan armilon! Kaj tute nediskutendas ĉu tiu armilo partoprenas "justan" aŭ "maljustan" militon! (Ŝajnas ke plejparto de la interesitoj trovis ĝin ne subteninda, laŭ la balotoj antaŭnelonge okazintaj en Nikaragvo...)

Mi forte kredas principon kiu ĝis nun sukcese gvidis mian esperantistan vivon: Temas pri principo de neŭtraleco. Ne por nevundi ies sentemon, sed por mem teni klaran kaj senpasian rigardon al gravaj aferoj...

Evidente mi ne celas ke oni ne devus mencii koncerton nur pro tiu ke ĝi monapogas militadon kaj sekve hommomortigon. (Kaj krome FSLN ne estas ia liberiga gerilo, ĝi estas ja normala ŝtatarmeo), sed enmeto de foto estas (laŭ mi) troa emfazo...

Nu, ĉu Rok-Gazet' akceptos daŭre publikigi primuzikajn tekstojn rilatantajn al ia ajn speco de perforto aŭ malamo? Ĉu do morgaŭ tutpaĝi pri novnazia rokkoncerto? Ĉu poste publikigi la partituron de "Rock around Iraq tonight!' aŭ eble "Antaŭen, Sadam, benita filo de l'Profeto!'? Mi esperas, ke ne...

Same mi esperas baldaŭ kontribui al Rok-Gazet per pli pozitivtona teksto! Dume akceptu elkoregajn salutojn de via

Ancxjo



*** ĈESU MIN SEPULTI ***

Karaj miaj junaj geesperantistoj

Artikolverkumado neniam estis mia fervora kuira kampo. Sed finmaĉinte la pladon "Iom pri la muzikstelo Vladimir Soroka" (TT N°2 1990)[RG 1)22],kiu signifas por mi iom pri mi mem", mi tuj eksentis kapablon prepari por vi ion pli bongustan kaj sen kemiaĵoj. Do bonvolu gustumi.

Porkomence, tamen, permesu min danki mian talentan amikon Andreo Ananjin, kiu scianta pri mi nun same malmulte kiel mi pri li, preskaŭ konvinkis min pri mia arta morto. Bravo!



RESPONDE AL REAGOJ

La leteroj de Flavio kaj Anĉjo ĝojigis nin ĉar ni konstatas ke larĝa debato povas stari pri temoj tre diversaj kaj interesaj kiuj rilatas ne nur pri Muziko kaj Esperant'.

Ni malfermas niajn paĝojn al tiaj debatoj.

Pri respondo de Flavio, ni konsentas pri liaj vidpunktoj, sed vidu ankaù la respondon tiurilate en la intervjuo de Jomo de la Rozmariaj Beboj kiu estas nova Esperantisto kaj sperta Rokmuzikisto.

Pri respondo de Anĉjo ankaù ni konsentas pri liaj rimarkoj.
Estonte ni plibone atentos pri tio.
Neniam estis nia intenco aperigi tekstojn pri perforto aù malamo.
Tamen, ni ne povas nin deteni antaù maljusteco, homekspluatado kaj subpremo kiel vi certe legis en "Urĝe", "Rokgrupo Alibi", KTP...

Tio ribeligas nin, ribelo estas nek perforto nek malamo sed multe pli ol tio.
Ni nur deziras ke ĉiu povu liberé esprimi siajn sentojn.

La redakcio.

Nekrologo ne tro loga :

Ankoraŭ unu falis !

Jam siaviva duonlegendo pro sindetruemado laù purega rokenrolstilo, la novjorkitalo **Johnny Thunders** ĉimonate aliĝis la paradizon de falintaj roksteloj je aĝo 39jara.

Paĉjego de punkanaro pro unua grupo la **New York Dolls** («Novjorkaj Pupoj») kun vestaĉaro ekscesega kaj ineca, li regale permesis al si saboti esperigan karieron vore konsumante nocajn kaj detruajn substancojn. Fidelegega je fama formulo «Sekso, Drogo, kaj Rokenrolo», li forlasis la New York Dolls, tuj reformonte la **Heartbreakers** («Korpeniguloj»), grupon konontan samkiale saman sorton. Sinjoro Thunders estis siaarte majstrego: roko rudimenta, agresa, brutala, kaj efika, ĉe malorda kaj raùka sono. Li daùrigis unuopan diseman karieron kun oftaj preteroj en Francion, akceptejon de rokuloj mishonoritaj kaj forpelitaj de la nova kontinento.

Irinte al Novorleano kuniĝonte kun **Willy Deville** (mem solide rekomencanta karieron for de ruintenta Novjorko), li tie mortis pro trodozo.

Sed malgraù klara preferemo je artefaritaj paradizoj ol muzikkomponado, rekte kondukonte lin en punktofinan paradizon, li postlasis kelkajn asasinajn refrazojn kaj vere divinan ferruban sonon.

Donu al li almenaù ĉilastan omaĝon: forbruligu cigaredon kaj forglutu lastan bieron aùskultante ***Sad Vacation (Hurt Me)*** (« *Trista Ferio (Penigu Min)* »).

Post larmeto li enlegendiĝos.

– Kruela Devil
(trad. RoKo)



- **Diskaro (kompletigota)**

New York Dolls: *Lipstick Killers* (1972)
New York Dolls: *New York Dolls* (1973)
New York Dolls: *I'm Too Much Too Soon* (1974)
J. Thunders: *L.A.M.F.* (1977)
J. Thunders: *So Alone* (1978)
J. Thunders: *Que sera, sera* (?)
J. Thunders kaj Patti Palladin: *Copy Cats* (1989)

Plus kelkaj «scenejaĵoj».

BAMARO

La unua internacia junulara renkontiĝo dumsomera en Tutgermanio!

somerumado ĉe la balta maro; amika, juneca etoso; diversaj ekskursoj ...

13.-20.7.1991 en Stralsund

Aliĝilon sendas kontraŭ 1 IRK:

Germana Esperanto-Junularo
Rheinweg 15
D-W-5300 BONN 1, Germanio.



NOMOJ DE MUZIKSTILOJ

SPECIMENOJ EL

ROKO KAJ POPO - POPULARMUZIKA TERMINARO EN ESPERANTO DE BERTILO WENNERGREN

afr(o)- *afro-* Prefiksa mallongigo de Afriko (simila al Eŭr(o)- por Eŭropo en PIV). Uzata en la nomoj por miksoj de Afrika muziktradicio kun diversaj popularaj muzikstiloj. → Afroroko *Osibisa*, afrodiskoo *Akie Deen*, afroregeo *Sonny Okusun* ktp. Vd bakango, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo.

bakango, bakangomuziko *mbaqanga*. Moderna populara muzikstilo en Sud-Afriko, influita de ritmenbluso, roko kaj regeo. *Soul Brothers; Steve Kekana; Paul Simon: Graceland*. Vd afro-, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo.

barbireja kantado *barber-shop (singing)*. Stilo de senakompana, normale (kvar)vira, harmonia kantado, kiu estis jam establita en la tempo de Ŝekspiro en Anglio, kiam oni provizis liuton por ke atendantaj klientoj en la barbirejoj povu sin distri per kantado. Ĝi repopulariĝis en la Usona okcidento (ĉ. 1850) kiam oni serĉis oron; la barbiro provizis gitaron por trankviligi siajn sendisciplinajn klientojn.

blugraso, blugrasmuziko *bluegrass*. Muzikstilo, kvazaŭ prakantrio, uzanta nur akustikajn instrumentojn, kiel banĝo, violono, mandolino, gitaro kaj dobro. *Blue Grass Boys; New Lost City Ramblers*.

bluso *blues*. Muzikstilo kreita de la Usonaj negroj el kantoj laboraj, religiaj ktp. La ĉeftemo de bluso tradicie estas malĝojaĵoj. *Blind Lemon Jefferson; Bessie Smith*. Vd blusa harmoniko, blusa tono, blusroko, dekdumezura bluso, delta bluso, kampara bluso, ritmenbluso, urba bluso.

blusroko, blusrokmuziko *blues rock*. Muzikstilo kun elementoj de roko kaj bluso. *Yardbirds; John Mayall's Bluesbreakers; Canned Heat; ZZ Top*. Vd ritmenbluso.

bopo, bopmuziko *bop, bebop*. Ĵazostilo kreita en la 40-aj jaroj. *Charlie Parker; Dizzy Gillespie; Thelonius Monk; Kenny Clarke*.

bosanovo, bosanovmuziko *bossa nova*. Uson-Brazila muzikstilo kreita en la 60-aj jaroj. Parenca al sambo, sed pli trankvila. *A. C. Jobim; Stan Getz; Sergio Mendes*.

bugio, bugimuziko *boogie(-woogie)*. Pianostilo en 8/8-takto kun refraza baso kaj blusa akordostrukturo. *Jimmie Yancey; Fats Domino; Jerry Lee Lewis*. Vd ŝuflo.

ĉaĉao, ĉaĉadanco *cha-cha*. Latin-Amerika ritmo kaj danco. Vd rumbo, sambo, tango.

ĉarlestono, ĉarlestondanco *charleston*. Rapida fokstroto. Unu el la plej popularaj dancoj en la "feliĉaj" 20-aj jaroj.

ĉimurengo, ĉimurengomuziko *chimurenga*. La populara muziko de Zimbabvo. *Thomas Mapfumo*. Vd afro-, bakango, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo.

damna metalroko *doom metal*. Speco de metalroko, en kies tekstoj abundas temoj kiel nigra magio kaj la diablo. *Black Sabbath; Blue Öyster Cult; Judas Priest*. Vd rapida metalroko.



dekdumezura bluso *twelve-bar blues.* Tradicia paterno de bluso. Toniko 4 mezuroj — subdominanto 2 mez. — toniko 2 mez. — dominanto 2 mez. — toniko 2 mez. (aŭ simile). La tekstopaterno estas normale A A B.

delta bluso *delta blues.* La blusa stilo kreita en la regiono de la Misisipa delto, ofte konsiderata la naskiĝloko de bluso. *Charley Patton; Bukka White; Howlin' Wolf; Muddy Waters.* Vd kampara bluso, urba bluso.

diksilando, diksilandmuziko, diksilandĵazo *dixieland (jazz).* Ĵazostilo evoluigita el la Nov-Orleana ĵazo fare de blankuloj en la 20-aj jaroj. *Jimmy Ryan; Eddie Condon.*

diskoo, diskoa muziko *disco (music).* Speco de dancmuziko kreita origine por la diskotekoj. Nun oni multe ludas aliajn muzikstilojn ol diskoon en la diskotekoj. *Donna Summer; Boney M; Saturday Night Fever.*

elektra bugio *electric boogie.* Nov-Jorkdevena strata dancado modiĝinta komence de la 80-aj jaroj, karakterizata inter alie de robotecaj movoj. Parenca al rompdancado. Vd hiphopo.

elektronika popo, elektronika popmuziko *electro-pop.* Speco de popmuziko en kiu dominas sinteziloj kaj komputiloj. *Depêche Mode; Orchestral Manoeuvres in the Dark.* Vd elektronika drumo, drumomaŝino.

fokstroto, fokstrotodanco *fox-trot.* Populara pardanco en 4/4-takto, aŭ muziko por tia danco.

folklora roko, folklora rokmuziko *folk rock.* Mikso inter roko kaj iu folklora muziko. *Fairport Convention; Steeleye Span; Alan Stivell.* La esprimo *Folk rock* havas en Usono iom specialan sencon *(Bob Dylan; Byrds)*, sed ankaŭ tio estas speco de folklora roko, nome Usona folklora roko.

freŝa ĵazo, freŝa ĵazmuziko *cool jazz.* Ĵaza stilo aperinta en la 50-aj jaroj, karakterizata de senstreĉa ritmo, fluida sono kaj sobraj harmonioj. *Lester Young; Miles Davis; Stan Getz.* Vd bopo.

funko, funkmuziko *funk (music).* Speco de tre ritma, sinkopa populara muziko parenca al soulo. *James Brown; Parliament Funcadelic; Rufus.* Vd repo.

gospelo, gospelmuziko *gospel (music).* Formo de religia muziko kreita de la Usonaj negroj. Vd bluso, soulo.

hajlajfo, hajlajfmuziko *highlife.* Populara muziko en okcidenta Afriko, parenca al kalipso. *E.T. Mensah; Victor Uwaifo; African Brothers.* Vd afro-, bakango, ĉimurengo; ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo, palmvina muziko.

hardo. EVITINDA. = **ŝtonroko.**


hevio. EVITINDA. ⟹ **metalroko.**

hiphopo *hip hop.* Nov-Jorkdevena kulturo modiĝinta en la 80-aj jaroj. Inkluzivas repon, elektran bugion, grafition, gratadon, rompdancadon ktp.

ĵazo, ĵazmuziko *jazz.* Usondevena muzikstilo karakterizata ĉefe de improvizado. Ekzistas multaj diversaj ĵazostiloj. Vd ragtimo, diksilando, Nov-Orleana ĵazo, svingo, bopo kaj freŝa ĵazo.

ĵazroko, ĵazrokmuziko *fusion (rock). jazz-rock.* Tre diversspeca muzikstilo. Mikso inter ĵazo kaj roko (kaj aliaj stiloj). *Chicago; Mahavishnu Orchestra; Soft Machine; Weather Report; Return to Forever.*

ĵinglo *jingle.* Tre mallonga muzikpeco uzata en reklamo, aŭ kiel enkondukaĵo al radia aŭ televida programo.



ANONCETOJ

"KONSULTLIBRO PRI MUZIK-TERMINOJ EN ESPERANTO"

Mi petas la proponon de inkluzivotaj terminoj en la formo de citaĵoj kiuj nepre montru la uzmanieron, aù per uzo en frazo, aù per difino en esperanto (ne en nacia lingvo). Muzikaj citaĵoj ankaù bonvenas.
Proponojn oni sendu al Andreo MARSHALL,
42 High Street Wiltham
Grimsby - S.humb- DN 37 OPL
Anglio.

IRANA MUZIKISTO

22 jaraĝa, gitaristo deziras korespendi tutmonde pri muziko kaj speciale gitaro, belaj artoj :miniatur-pentrarto, danco, paco, amikeco. Interŝanĝas bildkartojn mi respondos ĉiujn leterojn:
M. MEHDI NORUZI N°9
Shahid Mokhtari Alley, Ghods.
Shahzeid st. Bozorgmehr Ave,
ESFAHAN 81579
IRANO

PRI SOVETIA ROKMUZIKO

Glebo MALCEV volonte informos ajnulon pri sovetia rokmuziko (ne-E-a)) kaj eĉ por simbola pago surbendigos preskaù ajnan sovetian rokbandon (interesatoj petu liston). Tamen, necesas sendi kasedon por tio, ĉar malfacile akireblas en sovetio.
Turnu vin al: Glebo MALCEV
do Vostrebovanija,
Sverdlovsk-centr,
SU-620151 USSR





RADIO ANONCOJ

FERAROCK (Federacio de rokaj asociaj radioj) konstituiĝis en Montpeliero (Francio) la 15/02/91, okaze de la "Rokŝtatoj 91". ĝi celas grupigi kaj defendi la asociajn radiojn(kategorio A) kun roka temaro.
Bonvolu kontakti:
Françoise DUVAL
Radio FMR
9 bis Av F. Estèbe
F-31200 TULUZO





Mondmuzika-elsendo "MURUROA TWIST" deziras kontaktojn kun ĉinaj rokemuloj!
Mururoa Twist
S/a Lŭk HAAS
28 RUE DE SOULTZ
F-67100 STRASBOURG

Rumana radio el Cluj-Napoca petas E-materialon
Esperanto Sekcio
Radio Cluj
str Donath 160
RO-3400 Cluj-Napoca

La Ondo de Esperanto
Ĉiu semajne, merkrede kaj vendrede, oni povas aŭdi per radio" Radio libera ondo" Trieste (Italio), laŭ 89Mhz FM, elsendon pri Esperanto, de la 15a ĝis la 16 horo(ĉirkaŭ)
La programo prizorgata de Anita kaj Mauro, nomiĝas "La ondo de Esperanto" kaj dissendas ankaŭ E-Rok-Muzikon.
Ili volonte akceptos vian kunlaboron, tiel vi riĉigos ĉi elsendojn ĉu per ideoj, ĉu per muziko, ĉu per aliaj temoj, dankon!
La Ondo de Esperanto
v Machiavelli 9
I-34100 TRIESTE

*-0-0-0-0-0-0-0-0 ni ne ploru 0-0-0-0-0-0-0-

Dialogo inter tEKNOKRATO kaj Ekologisto:
- La nukleaj centraloj estas TUTE sen Danĝ...
- Jes, mi vidas! Eĉ ne plu restas ...ERO!





ROKMUZIKA RETO

Jen pliaj adresoj kaj informoj por la E-Rok-Muzik-Reto. En ĝi vi retrovos jam aperintajn en Rok'Gazet', nur kiam plio koncernas ilin. Tiam la signo @ sekvita de la n° de RG, antaŭos ilian nomon. Se ili aperis ekster la paĝoj de la Reto vi trovos menciite la numeron de Rok-Gazet' sekvitan de la taŭga paĝo, sub la formo X)pp . La signo & en la cetero de Rok'Gazet' resendas vin ĉi tie mem, en la Reto! Enhavo klasiĝas laŭ inicialoj

Alain verkas romanojn franclingve. Li ankaŭ verkas kaj komponas kanzonojn, ĉiam franclingve, sed ĉifoje entenantaj kelkajn esperantajojn, ĉu vorto(j)n, ĉu ĥoron, celante tiel, tra sukcesa famiĝo, diskonigi kaj reklami por Esperanto. Kial ne?

Alain MARTELLI
La Cerise
F-06830 GILETTE

Andreo, kvankam abonanto de RG, preferas malrokmuzikon. Tio eble ne menciindus se li ne estrus pretigon de muzikterminaro [vidu anonceton kaj je Dimitar TERZIEV &]

Andreo MARSHALL
42, High Street,
Waltham, GRIMSBY,
S, Humb.,DN37 OPL,
ANGLUJO

ANCXJIO certe estas arda rokemulo por tiel grimpi ĉe la plafono kiam li ricevas RG. Almenaŭ tiaspecan reagon li deklaras en sia "lastmomenta" skribajo en jurnalo de PEA. Nin dankas lin por tio kaj la cetero[2)]

Antonio MARTINS
Rua Colonel Marques Leitao 27
3.E
P-1700 LISBOA

Andreo duope kantas kun Oleg Obuĥov akompanitaj de akustiklaj instrmentoj(gitaro, harmoniko,fluto, marakasoj kaj ĥoroj). ĝis nun ne eblis al ili bonkvalite surbendigi.

Andreo OBREZKOV
Demjana Bednego str.126-47
SU-153013 IVANOVO

Aleksandro proponas servojn de profesiaj popolmalrokmuzikistoj; petu informojn!

A.S.MELNIKOV, PK393
SU-344007 Rostov-Don-7

Gratulas, kuraĝigas, abonas kaj rokemulas:

Gildas LEMAITRE
Parc Van Loo— Jonquilles
F-13090 AIX EN PROVENCE

Glebo volonte informos ajnulon pri sovetia rok-muziko(ne E-a) kaj eĉ por simbola pago surbendigos preskaŭ ajnan sovetian rokbandon(interesatoj petu liston) Tamen necesas sendi kasedon por tio , ĉar malfacile akireblas en Sovetio. Turnu vin al:

@1 Glebo MALCEV
do vostrebovanlja
SVERDLOVSK-CENTR
SU-620151 USSR

Jomart [VIDU 2)]ĉiam serĉas pliajn koncerteblecojn. Bonvolu kontakti lin:

Jomart AMZEJEV
NARIMANOVA 1-37
SU-486031 TCHIMKENT

Juozas ĉiam pli interesiĝas pri Rok-Muziko.

@1 Juozas ABRAMAVICIUS
TOPOLIU 4-41
234580 ALYTUS-3
LITOVIO (USSR)

E-a Svislanda Junularo kunorganizas Kampado 91 festivalon.Se ve ni prizorgis vian aliĝon eble ankoraŭ tempas. [1)19]

@1 Junlaro Esperantista Svislanda
Sekretariejo Kampado 91
Poŝtfako 639
CH-8201 SCHAFFHAUSEN

Mi ŝatas Rok-Muzikon. Mi esta muzikstudento ĉe Indiana University (komponisto); min interesas la radio, scienca fikcio, kaj aliaj strangajoj. Paco, amo, kaj frenezo!

Jon LIECHTY
411 s.Henderson #15
BLOOMINGTON, W
USA-47401

Rok-muzikisto Popov Aleksandro, gitaristo, komponisto, poeto URĜAS, Skribu al jenaj adresoj:

—SU-117571 MOCBA, AMEM (por POPOV A.K.)
—SU-329412, Nikolajevskaja oblastj, Snigirjovskij rajon, s. Centraljnoje,
IN-316/6 - 5, POPOV A.K.
/tel: 2-72-96/

Andreo tre interesiĝas pri E-Muziko

Andreo J RAY
35 GREENLANDS
HEDWORTH ESTATE
JARROW
TYNE AND WEAR
NE32 4NL BRITUJO

Anne estas vojaĝema rokemulino kiu posedas solidan humuron.ŝi kontakteblas ĉe

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO
Anne WAGNER
Brunnsgatan 21
S-111 38 STOKHOLMO

Betti MAUL helpas organizadon de internacia PAC-KONCERTO en Jugoslavio komence de oktobro:

@1 Betti MAUL
Pferseer Strasse 15
D-8900 AUGSBURG, FRG

La ĉefredaktoro de MEL kunlaboras al la Muzikterminaro de andreo MARSHALL.

@1 Dimitàr TERZIEV
UL. Milin Kamàk 58
BG-1421 SOFIA

"LUZ DO AR",portugallingve, "Aerlumo" E-a versio kaj "Flavio FONSECA en Esperanto" mendeblas ĉe UEA aŭ BEL
BEL cp 11-1105
BR-70084 BRASILIA DF

Por la tuta cetero vi povas skribi, gratuli, brakumi kaj pli, rekte al:

@1 Flavio FONSECA
Caixa Postal 3532
BR-70084 BRASILIA DF





Jak eldonas legindan kaj legendan(ĉiusignife!) gazeton plena de ĉio kaj eĉ da humuro. La pruvo? Ili kuraĝas asertI ke iu "Rok-Gazet"" estus la plej indal Se ili celus "inda por la rubujo", mi konsentus... ĉiukaze vi nepre devas aboni LKK eĉ se vi ne ŝatas ridi; tiel estas! Kion vi trovos tie, en La KancerKliniko, nenie alie vi trovos, eĉ ne en ĉi tiuj paĝoj!

Jak LEPUIL
Lieu-dit "les Cocherats"
F-18210 THAUMIERS

Sro ANDREEV estas por ni pli ol peranto:

Sro Ilija ANDREEV
PK120, 9700 Šumen
BULGARIO

Kiu ankoraŭ ne scias kiu estas Mikke petu de li! Vivu Mikke!(jen finfine(eble) la kompleta adreso!)

@0)12 Mikke Englund
Love Almqvists v.8
S-112 53 STOCKHOLM

Marcelo tre aktivas por E-Rok-Muziko kaj Esperanto. Li organizas SAT Amikaran Kongreson 92, laŭ temo : Muziko de MOZART ĝis EUROKKA, en Bordoza regiono, kie, ni ne scias! Nepre viglos koncertoj en la programo, kaj projekto tre plaĉis al respondeculoj. Post kongreso de Amboise tio ja estas peza tasko! Disponeblas E-tekstoj de BRASSENS vidu[2)

Marcelo REDOULEZ
Camarsac
F-33750 St GERMAIN DU PUCH

Mendi, Irana gitaristo, estas 22 jaraĝa. Vidu anoncon;

Mendi Noruzi No9
shahid Mekhtari Allen Ghods
Shahzeid st, Bozorgmehsr Ave
ESFAHAN 81579 IRAN

Max gvidas junulgrupojn en Adelaid-universitato. Li kontaktas kun junulo kiu surbendigas lokaj grupojn en propra studio. Ni esperas baldaŭ ricevi freŝan novajon laŭ kiu estiĝos E-Rok-Muzika surbendigo! Ĉu estus tro peti?

Max WEARING
30 Westbury STREET
Hackney SA 5069
AŬSTRALIO



Jen Japano kiu interesiĝas pri E-Rok-Muziko:

Nakamura Makoto
Tt18 Misima-gun,
Simamito-Ty6
Hirose 4-12-6
JAPAN

Nenad organizas internacian PAC-KONCERTON en Jugoslavio, komence de oktobro, samtempe en pluraj urboj.

Nenad Propadovic
ul. 99 br.14
YU-32000 ĈAĈAK

NikSt elĉerpiĝas provante diskonigi EUROKKA kaj RG precipe ĉe radioj

SU-117571, MOSKVO
ul 26 Bak Komissarov,
7-3-78
STEPANOV N P

Niko estas talenta desegnisto kiu kunlaboras al RG.Li ankaŭ peras[2)2]. Kaj multe agadas por E-R-Muziko.

Niko VOLOŜIN
Luck -18, a.k. 26
SU-263018 UKRAINIO

"Kredo" E-Art-Rok-Muzik-grupo bezonas ne nur kuraĝigojn: rimedoj malabundas sed plene kontentigus la duopo "Yamaha DX7" kaj "Roland D50" kiuj mankegas al ili.Kiu havas ideon por helpi al ili. Ĉu rekte el Japanio(aŭ eĉ japanaj uzinoj(ambaŭ markoj estas japanaj)) eblus? [1)20]

@1 Oleg SVIRSKIJ
Revolucii 2-12
SU-152905 RIBINSK
USSR

0)10 Ni ĉiam atendas la lastdatan adreson de Zhou Mack alias Tufuene Mafuila

Lin vi ne absolute devas kontakti, por partopreni IJS: ankaŭ eblas UEA en Rotterdam. Aŭ pagi surloke; ATENTU aliĝo post10/7/91 kostos pli!

Szilvasi Laszlo
PK 87
H-1675 BUDAPEST

Li elkore subtenas nian agadon kaj tre interesiĝas pri iu aparta Pigo!

Siegfried WAGNER
Am Alten Gothaer Weg 5
D-O- 5812 WALTER-SHAUSEN
FRG TURINGIO

SOLO, la bando de Eduardo troviĝas en Malaga [vidu 2( ]

SOLO, Eduardo VARGAS
Gutierrez Ayala 5, 4°D
(3 nuevo)
E-29002 MALAGA

De ĉie el la mondo homoj interesiĝas pri ni kaj propagandas. Gwenda estas la unua en Nov Zelando

Gwenda SUTTON
12C Herbert Gardens
186 the Terrace
WELLINGTON-1
NOV-ZELANDO

Georgo el Budapeŝto kolektas ĉiujn esperantregistrajojn: diskoj, bendoj, kasedoj, vidbendoj, filmoj, ktp... petu manliston!

@1 Georgo CSULLOG
PF 189
H-1502 BUDAPEST

John sol-ludas gitaron kaj estras la metalrok-bandon Torino el Brasilia. Mi ne sukcesis kompreni ĉu ili jam kantas Esperante aŭ cû ili nur tion intencas, sed ĉiukaze ili bezonas kuraĝigojn: Skribu!

"John" Joao Carlos do Nascimento
QR406- Conjunto 10 - Casa 29
Samambaia
BR-723000 - BRASILIA - DF

Andreo ORLOV instigas rokgrupon "Alibi" [vidu 2)], pretigi Esperanto-programon. La afero estas plene interkonsentita kaj EUROKKA atendas senpacience novajojn.

@Andreo ORLOV
109004 MOSKVO
p/K 78 USSR

Freŝdata Esperantisto, sed rokemulo estas:

Nicolas Gil Carballe
PK APD 305
E-24080 LEON

Ĉia helpo al internacia filantropia muzika E-centro estos bonvena kaj antaŭiĝos la malfermon planita por aŭtumno1992 [Vidu 2)]

Esperanto Centro
Vladimir Soroka
Brunnsgatan 21
S-111 38 STOCKHOLM


TBC [0)5] mankas pri koncertoj, devigaj ferioj pezas al ili! jen ilia nova adreso:

Wospil Adrienn
KONYVES KRT 84/G
H-1087 BUDAPEST VIII



novaj DISKOJ

















MENDU ĉe
EUROKKA







EUROKKA
Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE
FRANCE

CRYSTAL CREATION - Imprimerie - 31450 DEYME - Tél. 61 81 59 77